


IL POPOLO CINQUE

中國報通

11

1985





Ĉinaj esploristoj en Antarkto
Foto de **DŪAN ĜJIŬEN**

Enhavo

Esperanto:

Pri la 70-a UK	2
Vojaĝo en Jugoslavio	20
[Sur nia librobreto] Du majstraj tradukoj poeziaj	22
[Por komencantoj] Kiel kreiĝis segilo. Ĝang Heng nombris stelojn	49
Esp-novaĵoj	24

Por celebri la 35-jaran jubileon de "El Popola Ĉinio":

Gratulo kaj espero	18
Al "El Popola Ĉinio"	19

Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ (11): Prosperas la tibeta loĝantaro

Malfermitaj urboj: Banjana urbo Fuĝoŭ

Industrio: En la 120-jara aĝo

Fiŝbredado: En akvo-vivaĵaj kulturejoj

Scienco: Ĉina esplora bazo en Antarkto

Literaturo:

La novela verkado de Ĉinio en la lastaj dek jaroj	43
Klara baseno (Novelo)	46

Arto: Sportaj skulptaĵoj

Higieno: Pri la sanprotekto de la virinoj kaj infanoj en la ĉina kamparo

Popola vivo: Steloj el la limregionoj

Vojaĝo tra Ĉinio: Belaj pejzaĝoj de Hangĝoŭ

Enciklopedieto de Ĉinio: Moroj de ĉinoj en manĝado

Internacia problemo: Protekto de "vivpana korbo" de la homaro

Inter ni

Kurantaj aferoj

Ĉinlingva kurso

Sur la kovrilo: Sro Chun-Chan Yeh (maldekstre), ĉina verkisto kaj Esperanto-tradukisto, s-ro Grégoire Maertens, prezidanto de UEA, kaj s-ro William Auld, Esperanto-poeto kaj tradukinto de "Montara Vilaĝo" (kies aŭtoro estas s-ro Chun-Chan Yeh), en intima interparolado

Foto de LAŬ BAJ

Sur la dorskovrilo: Salikokoj (Ĉinstila pentraĵo)

de ĈJI BAJŜI

Interne de la kovrilo: Ĉinaj esploristoj en Antarkto

Foto de DŬAN ĜJIŬEN

Interne de la dorskovrilo: [Fotoj faritaj de E-istoj]

1. Printempo en Norvegio
2. En Sofio, Bulgario

de W. ULLMANN (FR Germanio)
de ALI-REZA-HASSAN (Irano)

PRI LA 70-A UK

Artikolo kaj fotoj de LAŬ BAJ

En la unua tagdeko de aŭgusto en la suda urbo de FR Germanio Augsburg okazis la 70-a UK, kiu daŭris unu semajnon, kun pli ol 2 300 personoj el 57 landoj. La kongreson ĉeestis la dekmembra Ĉina Esperanto-delegacio gvidata de s-ro Ĝang Ĉjiĉeng. Dum la kongresa semajno oni salutis kaj interparolis en Esperanto. La kongreso plena de familiara, solidara kaj amika etoso aldonis festan brilon al Augsburg, kiu festas sian 2 000-jaran jubileon.

Prezidanto de UEA s-ro Grégoire Maertens prezidis la inaŭguron. Post lia parolado diplomataj reprezentantoj de pluraj landoj salutis la kongresanojn. Ĉina ambasadoro Ĝuo Fengmin emfazis la atenton kaj subtenon de la ĉina registaro al Esperanto-movado. Li diris, ke Ĉinio bezonas koni la mondon kaj la diverslandaj popoloj volas koni Ĉinion. Tiurilate Esperanto ludas sian apartan rolon. S-ro Ĝuo bonvenigis la ĉeeston de pli da esperantistoj en la venonta UK en Pekino. Fine li diris dankon en Esperanto. Lia parolado ricevis fortan aplaŭdon de la ĉeestantoj.

LA INTERESA KONGRESA TEMO

Ĉiujare la kongresa temo altiras al si multajn esperantistojn. La kurentjara temo estis "Antikvo


kaj moderno: kion ŝanĝi, kion konservi?" Pri tio oni interŝanĝis opiniojn. Multaj substrekis en sia parolado la rilaton inter la antikvo kaj moderno el la dialektika vidpunkto. Ne estas prava la aserto, ke ĉio moderna estas bona kaj ĉio antikva malbona. Kompreneble oni ne devas sekvi la rutinojn por kontraŭstari la disvolviĝon de la afero. Estas antaŭjuĝo insisti nur en unu flanko. Ekzemple, Augsburg, kie ni kongresis, estas urbo kaj moderna kaj antikva, kun 2 000-jara historio. Nun tie ankoraŭ konserviĝas multaj mezepokaj konstruoj plaĉaj al la loĝantoj. Oni devas vidi, ke antikvo estas bazo de moderno kaj moderno estas evoluo de antikvo. Tio estas leĝo de socia progreso. Iuj traktis la kongresan temon per la ĉiam kreskanta Esperanto-movado. D-ro Zamenhof kontribuis al la homaro per la internacia helpa lingvo science kreita de li antaŭ 98 jaroj. Tamen li neniam opiniis, ke tiu lingvo estas jam absolute perfekta kaj ne bezonas plu disvolviĝi. Kompreneble, estas solida la bazo de Esperanto kaj sur tiu bazo oni povas kreive evoluigi ĝin.

"TRE BELA VIA PRELEGO!"

Fama ĉina tradukisto kaj verkisto Chun-Chan Yeh (Cicio Maro) partoprenis la kongreson. En



La kongresanoj



Ĉina ambasadoro Gǔo Fengmin donas salutvortojn.



La ĉina delegacio antaŭ la kongresejo

la Internacia Kongresa Universitato li faris prelegon sub la titolo "Hans Andersen en Ĉinio".

Tuj post lia prelego profesoro Paul Neergaard, veterana dana esperantisto kaj semopatologo, manpremis lin dirante: "Tre bela via prelego! Vi kaj Andersen profundigis la amikecon de Ĉinio kaj Danlando." Ankaŭ iu maljuna franca esperantistino alproksimiĝis al Yeh: "Via prelego sorĉis min!"

MUNKENA KNABINO KAJ LA ĈINA ESPERANTO-MOVADO

Iun tagon iu juna germana esperantistino sin turnis al la ĉina delegacio. Ŝi diris, ke ŝi estas malnova amiko de ĉinaj esperantistoj, kvankam ŝi ne vidis ilin antaŭe. Ŝi bone sciis la ĉinan Esperanto-movadon. Ŝi lernis en la ĉin-lingva fakultato de la Munkena Universitato. Ŝi nomiĝis Slava Gärtner. Ŝi verkis tezon kun la ĉina Esperanto-movado kiel ĝia temo kaj per tio ŝi magistriĝis.

Ŝi diris, ke estas signifa la devastigo de Esperanto en Ĉinio. Multaj studis pri Ĉinio, sed ne konis ĝian Esperanto-movadon. Troviĝas iuj, kiuj pensas, ke nur en Eŭropo ekzistas Esperanto, kaj ne scias, ke Esperanto estis enkondukita ankaŭ en Ĉinion. Kia nekompleta scio! Jam en 1980 Slava Gärtner komencis studi la ĉinan Esperanto-movadon. Por tio ŝi foje veturis speciale al la Esperanto-Muzeo en Aŭstrio por unu semajno kaj tie ŝi konsultis multajn materialojn. Fine en la somero de 1984 ŝi verkis tezon pri la historio de

la ĉina Esperanto-movado de la komenco de tiu ĉi jarcento ĝis 1920. Ŝi intencis daŭre studi pri tiu historio de post 1920. Tio estas tre interesa.

KUNSIDO DE LEGANTOJ KAJ AŬSKULTANTOJ

Por peti opiniojn de legantoj kaj aŭskultantoj pri la revuo "El Popola Ĉinio" kaj Esperanta elsendo de Radio Pekino, s-ro Ŝju Ŝanŝu, vicestro de la ĉina delegacio kaj vicestro de EPĈ-redakcio, okazigis kaj gvidis kunsidon dum la kongresa semajno.

La kunsido estis plenplena de preskaŭ 200 personoj, inter kiuj troviĝis iuj, kiuj abonis la revuon jam de ĝia unua numero kaj bindis ĝian jarkolekton por konservo. Multaj samideanoj estis kontentaj pro tio, ke Radio Pekino kaj "El Popola Ĉinio" donis al ili sciojn, informojn kaj plezurajn.

En la kunsido iuj ĉeestantoj prezentis kritikojn kaj proponojn al EPĈ-redakcio kaj Radio Pekino. S-ro Ŝju Ŝanŝu bonvenigis iliajn opiniojn kaj montris deziron enhance pliriĉigi la revuon kaj venki ĝiajn supraĵecon kaj unuflankecon, por ke ĝi trovu ŝaton ĉe pli da legantoj. Ankaŭ s-ino Hang Ĝjun, intervjuistino el Radio Pekino, dankis siajn aŭskultantojn pro iliaj bonaj rimarkigoj.

GAJA INFANA KONGRESETO

En alia loko de Augsburg renkontiĝis 38 esperantistetoj el 12 landoj. Ili, minimume 7-jaraj,



Ĉinaj esperantistoj amikiĝis kun alilandaj samideanoj.

partoprenis la Infanan Kongreseton sub la gvido de siaj gepatroj. Prizorgate de volontuloj, ili havis diversajn aktivadojn. Ili el malsamaj nacioj parolis libere unu saman lingvon Esperanto kaj per tio starigis amikecon inter si. Sub la gvido de plenkreskuloj ili ekskursis al la urbo, pririgardis ĝiajn historiajn restaĵojn kaj vizitis ĝian zooloĝian ĝardenon. Ili faris interesajn dometojn, bestetojn ktp. el diverskoloraj paperfolioj. Krome, ili ankaŭ partoprenis en konkurso de deklamado kaj kantado. Kun ĝojo iliaj gepatroj spektis ilian prezentadon.

ATENTATAJ AKTIVADOJ

Okaze de la 40-a datreveno de la unuaj ĵetoj de atombomboj en Hiroŝima kaj Nagasaki japanaj kongresanoj karakterizis lundon (la 5-an de aŭgusto) kiel la Tagon de la Paco. La memor-kunsidon ĉeestis 120 personoj el 22 landoj. Esperantistoj el diversaj landoj raportis pri siaj porpacaj agadoj. Tio estis unu el la trajtoj de la 70-a UK kaj vekis la atenton de multaj esperantistoj.

Dum la kongresa semajno la Bulgara Esperanto-Teatro dufoje prezentis la "Kretocirklon" kaj akiris grandan sukceson.

Dume ankaŭ iris kunveno de Komitato de UEA, kiu akceptis du novajn komitatanojn, el kiuj unu estas ĉina esperantisto Daj Song'en. Do, la komitato nun havas tri ĉinajn membrojn. Kaj tio montras plian subtenon de UEA al la ĉina Esperanto-movado.

LA GRANDA MURO ATENDAS NIAJN GASTOJN

Multaj amikoj tre atentis la 71-an UK en Pekino. Pro tio la ĉina delegacio prezentis en la programo "Estontaj UK" la ĝeneralan aspekton de Ĉinio kaj projekciis bildbendon pri pejzaĝoj de Ĉinio, ĝiaj turismaj urboj kaj ĝiaj tradiciaj manĝaĵoj. Post tio LKK-anoj de la venonta UK solvis la demandojn starigitajn de esperantistoj pri diversaj koncernaj detaloj.

Ĉe angulo de la kongreseja vestiblo estis ĝiĉeto por la 71-a UK. Ĝis la fino de tiu ĉi kongreso jam pli ol 800 esperantistoj de dekoj da landoj sin anoncis por la Pekina Kongreso.

Antaŭtagmeze de la 10-a de aŭgusto okazis la fermo. En la nomo de LKK de la 71-a UK Ĝang Ĉjiĉeng akceptis la kongresan flagon — verdan flagon. Tuj poste li faris mallongan paroladon. Li diris, ke la venonta UK en Pekino estis longe atendata de la ĉinaj esperantistoj. Jam en 1963 marŝalo Ĉen Ji, ĉina vicĉefministro kaj ministro de eksteraj aferoj, proponis okazigi tian kongreson en Pekino. Li mortis antaŭ pli ol dek jaroj, tamen oni baldaŭ realigos lian deziron. S-ro Ĝang Ĉjiĉeng daŭrigis, ke sukcesis la 70-a UK en la antikva okcidenta urbo Augsburg kaj ankaŭ brilos la 71-a UK en la antikva orienta urbo Pekino. Li invitis refoje gesamideanojn al Pekino. Ilin atendas Ĉinio, ilin atendas ankaŭ ĝia Granda Muro. Liaj vortoj ricevis aplaŭdon de la ĉeestantoj.


Post la kongreso la ĉina delegacio dividiĝis en du grupojn. Unu vizitis Crailsheim kaj Koblenz kaj la alia Paderborn, Duisburg kaj Hamburg. En tiuj lokoj la ĉinaj esperantistoj estis bone akceptitaj de la gastigantoj.



En tiu sporthalo okazis la inaŭguro de la 70-a UK.



S-ro Grégoire Maertens donas inaŭguran paroladon.



*En la nomo de LKK de la 71-a UK s-ro Ĝang Ĉji-
ĉeng akceptas la kongresan flagon.*



Por aliĝi al la 71-a UK en Pekino






Ĉina ambasadoro Gūo Fengmin (la tria de dekstre), estro de la ĉina delegacio Ĝang Ĉjiĉeng (la kvina de dekstre) kaj nova ĉina komitatano de UEA Daj Song'en (la kvara de dekstre) en la kongreso

S-ro Ŝju Ŝanŝu, vicestro de EPC-redakcio, gvidas kunsidon de legantoj.



Esperantistoj faras prezentadon sur la urboplaco de Augsburg.



Fuĝou

MALFERMITAJ URBOJ

Banjana urbo Fuĝou

de ĜENG ĜENĜJE

Fotoj de SEN ĈEN

Kajo de la haveno Maŝej



Senkorpa lakaĵo, unu el la ĵamaj metiartaĵoj de Fuĝou


Laŭdire, pli-ol-70-jara Dong Bi'u, antaŭa ĉina ŝtata gvidanto, foje levis paron da "kupraj" leonoj pli ol du metrojn altaj en la Popola Halo en Pekino kaj tio mirigis la eksterlandajn gastojn surloke. Fakte la leonoj estas malplena metiarta lakaĵo produktita de Fuĝoŭ, urbo ĉe la ĉina sudorienta bordo. La loka malplena lakaĵo estas brilkolora, eleganta, malpeza kaj longe uzebla kun densa nacia stilo. Kiel la klozoneaĵo de Pekino kaj porcelanaĵo de Ĝingdeĝen, ĝi estas unu el la tri famaj metiartaĵoj de Ĉinio. Inter la renomaj metiartaĵoj de Fuĝoŭ troviĝas ankaŭ paperaj ombreloj, ostaj kombiloj, ŝtonskulptaĵoj de Ŝouŝan, skulptaĵoj *Longan*-ligno, gravuritaj bildoj el korko, silkaj, plumaj kaj plastaj floroj kaj artisme faritaj porcelanaĵoj.


Fuĝoŭ estas konata kiel banjana urbo pro tio, ke jam en Songdinastio en la deka jarcento oni komencis planti banjanojn ĉie en la urbo. Ĝi estas landfama metiindustria urbo, la ĉefurbo de Fuĝjan-provinco kaj ties politika, ekonomia kaj kultura centro. Ĝi havas kvin distriktojn kaj ok guberniojn, kun totala areo de pli ol 11 900 kvadrataj kilometroj kaj 4 750 000 loĝantoj.

Pro subtropika oceana musona klimato Fuĝoŭ suferas neniam froston kaj malofte varmegon. Ĝi havas abundan pluvokvanton kaj fekundan teron kaj estas unu el la gravaj produktaĵoj de komerca greno en la provinco. Ĉangle, apartenanta al Fuĝoŭ, estas gubernio riĉa je rizo. Pingtan-gubernio el 128 insuloj estas fama fiŝejo en la provinco. Fuĉing-gu-

bernio sude de Fuĝoŭ produktas sukerkanojn kaj arakidojn. Norde estas Ljŭjŭan-gubernio naturdotita per profunda golfo portanta la saman nomon kiel la gubernio kaj kuŝanta sudoriente de ĝi. Nordoriente de Fuĝoŭ sin trovas Ljanĝjang-gubernio kun plej alta fiŝ-produktokvanto en la provinco. Nordokcidente de Fuĝoŭ estas fama oranĝ-produktejo — Minhoŭ-gubernio. Pli okcidente situas Minĉing-gubernio, kiu produktas olivojn kaj abundas je bonkvalita kaolino. Jongtaj-gubernio sudokcidente de Fuĝoŭ havas ne nur grandan riĉfonton de akvoenergio, sed ankaŭ grandan produktokvanton de prunoj, piroj kaj persimonoj. La unuaj kvin gubernioj apud la maro kuŝas sur marborda linio longa je pli ol 1 100 kilometroj.

Parto de distrikto por ekonomia disvolviĝo





Laborlinio de muntado en la televidila kompanio Fuji administrata de Fuĝoŭ kaj Japanio

De antikve Fuĝoŭ estas grava havenurbo de Ĉinio. La haveno Maŭej pli ol 20 kilometrojn for de la urbo kovras areon de 60 kvadrataj kilometroj. Ĝi havas ses ankrejojn kun jara en- kaj elŝipiga kapablo de pli ol 2 500 000 tunoj kaj modernajn ekipaĵojn, staplojn kaj tenejojn. Ĝi rilatas kun komercaj ŝipoj de pli ol dudek landoj kaj kontaktiĝos kun pliaj. De tie oni povas veturi al Pekino, Ŝanhajo, Kantono, Hangĝoŭ kaj Nanĉang per ŝipo, trajno aŭ aviadilo. Inter ĝi kaj Hongkong funkcias kursoj de pasaĝer- kaj var-aviadiloj.

Fuĝoŭ estas bone disvolvita ankaŭ industrie. Precipe post 1949 ĝi ekhavis industriajn kvar-talojn orientan, okcidentan, sudan kaj nordan, en kiuj funkcias pli ol 2 000 entreprenoj metalurgiaj, maŝinaj, elektronikaj, ke-

miindustriaj, medikamentaj kaj malpez-industriaj kun moderna teknologio. En la venontaj jaroj ĝi starigos la ĉefajn industriojn de elektro, medikamentoj, manĝaĵo, ludiloj, krudmaterialo, plasto, maŝino kaj aŭtoj, ĉiu kun jara produktovaloro de cent milionoj da jŭanoj (ĉirkaŭ 2.8 jŭanoj egalas unu usonan dolaron).

En la lastaj jaroj Fuĝoŭ fariĝis pli kaj pli vigla en ekstera komerco. Ĝi laŭeble havigis al si eksterlandajn kapitalojn kaj importis avangardajn eksterlandajn ekipaĵojn kaj faris teknikan reformadon al malnovaj entreprenoj. Ĝi atingis rimarkindajn sukcesojn en fabrikado de novaj produktaĵoj, prilaborado de iuj materialoj, muntado de iuj aparatoj kaj laŭkontrakta konstruado en aliaj lokoj. Dank' al laboro de la Korporacio de Porkonstrua Investo de Fuĝjan, ĝi kune kun eksterlandaj komercistoj fondis la Suker-fabrikon de Fuĉing, la Angil-bredejon de Fuĝoŭ kaj la Ŝip-kompanion de Fuĝoŭ. De aprilo 1981 tuj post sia fondiĝo ĝis la fino de 1984 la Televidila Limigita Kompanio Fuĝjan-Hitachi administrata kune de ĉinoj kaj japanoj jam produktis 781 300 televidilojn kolorajn kaj nigrajn-blankajn kaj donis al la ŝtato pli ol cent milionojn da jŭanoj da imposto, 50-oble pli multe ol la investita monsumo. En la unua duonjaro de 1985 la kompanio produktis pli ol 150 000 televidilojn. En 1984 la pokapa produktovaloro de la kompanio atingis 456 000 jŭanojn. Tio estas la plej alta el tiuj de la samspecaj kompanioj de la lando. Kaj la kompanio Fuŝin, kiu importis ekipaĵojn el Japanio kaj faras entreprenadon kune kun tiulandaj komercistoj, produktis jam 147 000 bildotubojn en la unuaj kvar monatoj ĉi-jare. Ĉar la bildotuboj kun

marko Fuŝin jam atingis la internacian nivelon, la Ĉina Ministerio de Elektronika Industrio aprobis la vendoprezon fiksitan de la kompanio por ĝiaj bildotuboj kiom tiu por la importitaj. En Fuĝoŭ loĝas ĉirkaŭ 110 000 revenintaj Fuĝjan-devenaj elmigrintoj, ĉindevenaj eksterlandanoj, Hongkong-anoj kaj Aŭmenanoj. Ili ne nur amike vivas kun la indiĝenoj, kontribuante al la ekonomia kaj kultura disvolviĝo de la lando kaj la regiono, sed ankaŭ tre zorgas pri la ekonomia disvolviĝo de la hejmloko kaj la materia kaj kultura vivo de la lokanoj. Ekzemple, de post 1979 Fuĉing-gubernio ricevis pli ol 66 000 000 jŭanojn de la ĉinaj elmigrintoj kiel donacon kaj investon, preskaŭ duone kiom la budĝeta enspezo de la gubernio en la lastaj pli ol 30 jaroj. Per la monsumo oni konstruis en la gubernio lernejon, kinoteatron, hospitalon, fabrikan de ladmanĝaĵoj kun jara produktovaloro de 5 000 tunoj kaj suker-fabrikon kun taga produktovaloro de 2 000 tunoj.

Fuĝoŭ ĉe la Orienta Ĉina Maro estas brakumita de montoj. En la urbo staras la montoj Pingŝan, Juŝan kaj Uŝi kaj la pagodoj Bajta kaj Uta. En la orienta antaŭurbo staras la pitoreska monto Guŝan kaj la antikva templo Jongĉjŭan. Mingĝang-rivero trafluas la urbon kaj pli ĉarmigis ĝiajn pejzaĝojn. Fuĝoŭ havas termofontojn kiel sian apartaĵon. La termofonto kun bonkvalita akvo kaj longeco de kvin kilometroj apartenas al la sulfuraj fontoj kaj povas kuraci la dermatozojn, artriton kaj aliajn malsanojn.

Krom loĝdomoj, la magistrato de Fuĝoŭ konstruis ankaŭ domegon por ekstera komerco, Mingĝang-domegon, hotelon por el-

migrintaj ĉinoj kaj termofontan hotelon. Oriente de la placo "Unua de Majo" en la urbocentro, Ĉinio kaj Usono kunlabore establos centron de internacia ekonomia aktivado konsistantan el hotelo, ofidomo kaj internacia kunvenejo, kun totala areo de 46 000 kvadrataj metroj. En la centro oni konstruos ankaŭ vendejon, naĝejon, parkejon, kafejon, intertraktejon, eksponejon kaj elektroregadejon. Oni kontentigos gastojn ĉinajn kaj eksterlandajn per bona servo.

Por koncentri la kunan kaj kooperan entreprenadon de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj la propran entreprenadon de eksterlandaj komercistoj kaj akceli la internacian ekonomian kunlaboron kaj scienc-teknikan interŝanĝon, la magistrato de Fuĝoŭ difinis 23 kvadratajn kilometrojn en la malsupra baseno de Minĝjang-rivero por distrikto de ekonomia kaj teknika disvolviĝo. Nun oni laŭperiode kaj laŭvice konstruas universalajn fabrikodomojn kaj multigas kajojn kaj telekomunikajn kaj trafikajn instalaĵojn. Laŭ la principo de egaleco kaj reciproka utilo la magistrato de Fuĝoŭ afable invitas eksterlandanojn, transmarajn ĉinojn, Hongkonganojn kaj Aŭmenanojn kaj iliajn kompaniojn investi kapitalojn por fondi en la urbo fabrikojn kaj aliajn ekonomiajn entreprenojn precipe elektronikajn, instrumentajn kaj mezurilajn, malpez-industriajn kaj manĝaĵajn.

Novaj konstruaĵoj en la urbo



Teknikistoj de la Fuĝoŭ-a Fabriko de Sportistaj Svoj intertraktas kun eksterlandaj komercistoj.



Flughaveno de Fuĝoŭ



En akvo-vivaĵaj kulturejoj

Komence ĉi-somere mi vizitis fiŝistajn vilaĝojn kaj akvo-produktaĵajn kulturejojn de apudmaraj urboj de orienta Ĉinio. La atingoj de fiŝistoj en akvo-vivaĵa kulturado impresis min profunde.


KULTURADO DE SALIKOKOJ EN FABRIKO

En la vastaj maroj de Ĉinio vivas pli ol 1 500 specioj de fiŝoj, kio liveris deziratan riĉfonton por disvolviĝo de fiŝado.

Ekde 1949 la ĉina mar-ekspluatado disvolviĝis de sola fiŝkaptado al kaptado kaj bredado. En la pasinteco la holoturio, pekteno kaj halioto (*Halotis gigantea*), konataj kiel trispecaj marfrandaĵoj, proksimiĝis al pereopro manko de kulturado. Sed nun, dank' al la sukcesa kulturado de iliaj idoj ilia jara produktokvanto atingas ĉ. 2 000 tunojn. Antaŭe la nutroza meduzo ellasis ovojn aŭtune, kaj en la sekva julio la ovoj kreskis en la naski-

povajn, kiuj denove ellasis ovojn. Nun oni elkulturis naskipovajn meduzojn printempe, kio mallongigas la kulturan periodon kaj malfermas novan vojon por grandigi la meduzan produktokvanton. Kaj krome, Ĉinio sukcese kulturis idojn de bonspeciaj fiŝoj, kiaj nigra bramo, nigra mara bramo kaj pagrosomo (*Pagrosomus major*), plekogloso (*Plecoglossus altivelis*), lizo (*Liza haematochila*) k. a. Sukcesis ankaŭ la marakva kulturado de tilapio (*Tilapia nilotica*).

Fiŝkaptejo



Jam en la fino de la 70-aj jaroj Ĉinio sukcesis kulturi en bredejo idojn de salikokoj, valoraj marproduktaĵoj de Ĉinio. Kaj nun tia kulturado videblas preskaŭ en la marbordaj provincoj, urboj kaj aŭtonoma regiono de Ĉinio. Ĉiujare oni lasas certojn da milionoj da salikokidoj en marojn por pliigi la produktan kvanton. Nun, la jara produktokvanto de salikokoj de Ĉinio 20-oble pliigis ol tiu antaŭ ses jaroj.

Mi vizitis kulturejon de salikokidoj sub la Akvoproduktaĵa Kompanio de Laŭŝan-gubernio, Ĉingdaŭ.

La kulturejo situas apud ĉarma golfo. Rigardate de malproksime, ĝiaj domoj aspektas kiel forcejoj. En la kulturejo estas bredaj basenoj, prilaborejo de nutraĵoj kaj kompletoj da ekipaĵoj por purigi marakvon kaj liveri varmon kaj aeron. La estro de la kulturejo konigis al mi, ke por kulturi salikokojn oni devas unue akiri salikokidojn. En la pasinteco oni rete kaptis ilin el maro. Kaj tia kaptado povis influi la reproduktadon de la maraj estaĵoj, tial kulturado de salikokidoj disvolviĝis iom post iom. Komence oni faris tion en subĉiela lageto. En tia kondiĉo estis malfacile fari severan sciencan kulturadon kaj malalta estis ilia vivopova proporcio kaj nestabila estis la produktokvanto. Tio ne povis kontentigi la bezonon de la disvolviĝo de la kulturado. En 1979 Ŝandong-provinco ekprovis kulturadon de salikokidoj en fabriko.

Estis ankoraŭ malvarmete en la frua somero ĉe la bordo de la Flava Maro de Ĉinio. Sed en la kultura ĉambro de la fabriko estis tre varme kaj humide. Enirinte ĝin, mi vidis, ke en cementaj cisternoj en vicoj post vicoj ruliĝas veziketoj. La mastro diris



Salikoko-bredejo en Laŭŝan

al mi, ke ili estas por kulturi salikokidojn. Por liveri sufiĉe da oksigeno al la salikokinoj kaj salikokidoj en tre granda denseco, oni devas senĉese pumpi aeron en la akvon.

Sekve, la mastro klarigis al mi la ĉefajn rimedojn por kulturi salikokojn kaj la produktan proceson de la fabriko.

La ĉinaj salikokoj (*Panaeus orinetalis*) migrantaj vivas en maro. Ili travintras en la profunda akvo meze de la Flava Maro kaj en la sekva printempo migras al la riverbuŝoj ĉe la golfoj Bohaj, Lejĝoŭ kaj Ljaŭdong kaj al la sudorienta malprofunda maro de la duoninsulo Ŝandong por tie ellasi ovojn kaj serĉi nutraĵon. Kiam malaltiĝas la akva temperaturo de la proksima maro en la fino de aŭtuno kaj la komenco de vintro, ili denove migras al la profunda akvo. La artefara kulturado de salikokidoj estas kapti salikokinojn, antaŭ ol ili ellasas ovojn, poste kulturi la kaptitajn

salikokinojn per sciencaj metodoj por akceli iliajn seksglandojn pli frue maturiĝi kaj pli frue ellasi ovojn. Pli poste oni faras kovadon al la ovaro. Tiamaniere je 1.5 monatoj pli frue ol en maro, oni povas akiri salikokidojn, kiuj havas saman grandecon kaj fortan korpon kaj la proporcio de vivantoj estas alta.

La mastro diris, ke la ŝlosilo de la kulturado estas rigore teni la akvan temperaturon kaj doni nutraĵon racie. La salikokinoj kun bone evoluantaj seksglandoj komencas ellasi ovojn, kiam la akva temperaturo atingis 16°-17° C. Farinte tion ili mortis. Tiam oni devas filtre elpreni la ovojn kaj kulturi ilin en cisterno. Dum la kovado la akva temperaturo devas esti 18°-20° C. Kiam la larvoj elkoviĝas, oni devas iom post iom altigi la temperaturon ĝis 25°-26° C. Poste, en la daŭro de ĉ. 18 tagoj iras metamorfozo, la larvoj salikokidiĝas rapide. Kiam ili kreskas ĝis

7 mm, oni povas lasi ilin en maron. La tuta periodo de kulturado daŭras ĉ. 35 tagojn. En 1985 laŭ plano la kulturejo produktos cent milionojn da salikokidoj.

La ideala nutraĵo de la salikokaj larvoj estas unuĉelaj algoj, ovoj de rotatorioj (*rotatoria*), ovoflavo kaj sojfaba lakto, kiuj produktiĝas en la prilaborejo de la nutraĵoj.

La akvo en la kulturejo devas esti freŝa, senpolucia kaj sen malamikaj vivaĵoj. Ĉar la salikokoj vivas en la akvo, kiu havas certgradajn proporciojn de salo, oksigeno kaj pezmetaloj. Antaŭ ol enlasi marakvon en la cisternojn, oni devas filtri kaj precipiti ĝin.

KULTURADO DE PERLOJ

Forlasinte Ĉingdaŭ, mi veturis per ŝipo unu tagon kaj unu nokton al la akvo-produktaĵa kulturejo de Ljantang-distrikto de Ĉingpu-gubernio, Ŝanhajo, kiu situas sur la delta ebenaĵo de Jangzi-rivero.

La delto estas fama tra Ĉinio per abunda produktado de dolĉakvaj fiŝoj. Tie produktiĝas granda kvanto da fiŝoj multspecaj kaj bonkvalitaj. La akvo-produktaĵa kulturejo akiris po-

muan (unu muo egalas al 1/15 hektaro) fiŝ-produktokvanton de 750 kg. Ĝi kulturas ankaŭ hiriopsiojn (*Hyriopsis cumingii*) en fiŝcisternojn. En 1984 ĝi rikoltis 50 kg. da perloj.

Tuj post kiam mi atingis la urbeton Ljantang, mi venis al la kulturejo. Estis ora sezono por kulturi perlojn. Mi senĝene iris al ondanta cisterno, sur kies surfaco viciĝas ŝnuroj unu post alia kaj flosas bonorde buntaj plastikaj globoj, kvazaŭ akvolinioj en naĝejo. Sub la ŝnuroj pendas nilonaj retsakoj kun hiriopsioj por kulturi perlojn.

Tuj sekve, mi rigardis perlograftejon. Tie regis pureco kaj heleco. Apud la fenestroj staris lignaj tabloj, sur kiuj estis boteloj kun helflava steriliza likvaĵo. Tie la knabinoj duope laboras kiel lertaj kirurgoj. Unu malfermis la konkajn, kaj la alia enmetis maldikan plateton en la eksternan membranan histon de hiriopsio. Poste, ili metis la greftitajn hiriopsiojn en nilonajn retsakojn, kiuj sekve estis metitaj en la cisternojn por kulturi.

Iu knabino montris al mi ion malgrandan kiel rizgrajnon, dirante: "Tio estas perla kerno, formiĝinta el polurita konkpeceto. Tiuj platetoj, kiujn mi ĵus

metis en la hiriopsiajn korpojn, estas perlaĵ kernoj." Leginte nekomprenon sur mia vizaĝo, ŝi daŭrigis kun pacienco: "En akvo sableroj neeviteble enŝovas sin en la korpon de hiriopsioj. La lastaj sentas sin nekomforte kaj klopodas por forigi ilin. Se nesukcese, la ekstera membrano de ĝia korpo do sekrecias likvaĵon, kiu envolvas la sablerojn. La likvaĵo estas proteina perla materio. Kun tempopaso la sableroj estas tegitaj de tavolo post tavolo da perla materio kaj tiel transformiĝis en perlojn."

Post momento la estro de la distrikto Ljantang ordonis, ke iu elakvigu grandan hiriopsion, kaj malfermis ĝin. Mi trovis, ke en ĝi estas 40-50 brilaj perloj.

Iu teknikisto de la kulturejo diris al mi, ke Ĉinio plej frue kulturis perlojn en la mondo. La kulturado havas historion de pli ol 2 000 jaroj. En la 13-a jarcento Ĉinio plej frue kulturis figuran perlon — budhofiguran perlon. Nun la ĉina tekniko pri perlokulturado senĉese altiĝas kaj la produktokvanto de perloj grandnombre pliiĝas. La plej bonaj perloj havas 1 500 tavolojn. La grandaj kaj rondaj perloj kun regula formo povas rivali kun naturaj perloj kaj estas bonvenigataj en la internaciaj merkatoj.

(daŭrigo de p. 45)

belajn rakontojn pri nordaj kamparanoj. La unua priskribis ekstremam malriĉecon de kamparano en certa historia kondiĉo, de tio rezultintan interŝanĝan geedziĝon kaj la komplikitan tragedion kaŭzitan de ĉio ĉi tio al la amo inter la heroo Jang Bajniŭ kaj la heroino Je Je. La dua priskribis malgrandan montvilaĝon de Malnova Puto en profundo de Tajhang-

montaro, soifantan akvon. Akvomanko kaŭzis malriĉecon, sed la kamparanoj, kiuj ne volas senfare antaŭ la malriĉeco, faris batalon kontraŭ la naturo generacion post generacio. Iliaj sento, moralo, amo, feliĉo, kuraĝo kaj persistemo kunfandiĝis kun la batalo! La novelo plektis la du fadenojn pri akvo-serĉado kaj putofosado kaj lia travivaĵo, liaj amo kaj edziĝo, inverse rakontis

preĝadon pri akvo kaj akvoserĉadon de la kvar generacioj de lia familio. Sur tiu juna kamparano manifestiĝis historie sedimentintaj naciaj kulturo, karakterizaĵo kaj psiko, kaj ankaŭ forta allogo de sciencaj scioj kaj moderna civilizacio. Nuntempe, verkistoj estas en aktiva ekspluatado de la tradicia nacia kulturo, espereble post nelonge aperos pli atentindaj bonaj verkoj.



La ŝipfarejo Ĝjangan

EN LA 120-JARA AĜO

— Pri la ŝipfarejo Ĝjangan en Ŝanhajo

Fotoj de ĈJAN ŜJĈJI


Muntado de pruo

Ĝjangan, unu el la plej grandaj ŝipfarejoj de Ĉinio, fariĝis 120-jara en la 3-a de junio 1985.

Gi fondiĝis en 1865. Ĝia naskiĝo markis la komencon de la moderna industrio de Ĉinio. De sia naskiĝo ĝis la antaŭvespero de la Liberiĝo de Ĉinio en 1949, Ĝjangan faris 884 ŝipojn kun 316 000 toneloj.


En la 35 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio Ĝjangan faris 1 034 ŝipojn kun 1 294 000 toneloj, el kiuj la kapacito de 58 superis dekmil tonelojn. La de ĝi faritaj internacie avangardaj ocean-scienca mezura ŝipo Ĵanŭang, oceanscienca esplora ŝipo Ŝjangjang-hong n-ro 10 kaj oceana savŝipo J121 partoprenis respektive en mezurado kaj elakvigo de la unua ĉina longdistanca transporta raketo kaj la unua ĉina sinkrona komunika satelito kaj en la esplorado de Antarkto. Tio montris, ke la ĉina ŝip-konstrua tekniko atingas la mondan avangardan nivelon.

Nun Ĝjangan streĉe faras diversajn reformojn por iri en novan periodon de ŝip-konstruado.






La 21 000-tonela oceana ŝipo Ĝenfen lanĉata





Senrustigo per altprema akvo Foto de ĜOU SJUJING

75-100-tunaj arganoj projektitaj kaj fabrikitaj de la ŝipfarejo Ĝjangnan




Laborlinio por antaŭ-prilaborado de ŝtalplatoj





La oceansciencia esplora ŝipo Sjangjanghong, kiu partoprenis en la esplorado de Antarkto, estas farita ankaŭ de la ŝipfarejo Gjangnan.

La 27 000-tonela ŝipo Sihu konstruita por la Universala Navigacia Korporacio de Hongkong atingis internacian avangardan nivelon.



POR CELEBRI LA 35-JARAN JUBILEON DE LA FONDIĜO DE "EL POPOLA ĈINIO"

Okaze de la 35-jara jubileo de la fondiĝo de El Popola Ĉinio, ni ricevis gratulajn leterojn de multaj legantoj. En la antaŭaj numeroj ni jam publikigis kelkajn leterojn kaj en ĉi tiu numero ni aperigas kelkajn aliajn. Pro la limigitaj paĝoj de la gazeto ni ne povas publikigi ĉiujn gratulajn leterojn. Pro tio ni petas pardonon kaj esprimas koran dankon al ĉiuj niaj legantoj, kiuj zorgas kaj subtenas nian laboron.

La Red.

Gratulo kaj espero

Antaŭ dudek kaj pli da jaroj mi regule ricevadis kaj legadis vian revuon. Sincere dirite, tiutempe mi ne estis tre kontenta pri ĝia enhavo.

Antaŭ kelkaj tagoj, dank' al interveno de prof. Chen Yuan, kun kiu mi havis la plezuron konatiĝi antaŭ du jaroj kaj establi kun li amikajn rilatojn, mi ricevis la unuajn kvin n-rojn de 1985. Kia agrabla surprizo! La revuo nun estas vere unuaranga el ĉiuj vidpunktoj: enhava, aspekta kaj lingva. Mi trovis en tiuj kvin numeroj amason da interesaj artikoloj pri via lando, objektivajn informojn pri la spektakla progresado de Esperanto en Ĉinio, sciindaĵojn pri kulturaj eventoj, kortuŝajn literaturajn perlojn, belegajn kolorajn reproduktitaĵojn.

Tute speciale plaĉas al mi la fakto, ke vi sukcesas alloge prezenti la atingojn de via registaro, precipe sur la kampo de la nuna ekonomia reformo, sen maljustaj kaj ofte mensogaj atakoj kontraŭ aliaj ekonomiaj, sociaj kaj politikaj sistemoj.

Kvankam iom malfrue, mi tute kore gratulas vin pro la 35-jara Jubileo kaj deziras al vi sukcesplenan pluan laboron.

Ivo Lapenna (Britio)

Okaze de la 35-jara ekzistado de "El Popola Ĉinio" mi sendas al vi kiel iama kunlaboranto dum mia restado en Ĉinio kaj posta peranto en GDR miajn plej sincerajn kaj koregajn bondezirojn.

Hodiaŭ ĉiu esperantisto senhezite konfirmos ke EPC fariĝis,

precipe dum la lastaj jaroj, la plej interesa, la plej bela kaj plej bonstila Esperanta gazeto en la mondo. Ke ĝi restu tiel estas mia sincera deziro.

Karl Maier (DDR)

Antaŭlonge mi dezirus skribi al vi por gratuli pro via grava laboro favore de Esperanto kaj amikeco inter Ĉinio kaj ĉiuj landoj, sed tago post tago la tempo forflugis kaj mi ne plenumis miajn planojn.

Tamen, finfine mi faras ĝin hodiaŭ tre volonte okaze de la 35-jara Jubileo en "El Popola Ĉinio," gratulante al vi tre kore. Mi estas konvinkita ke nenia alia revuo laboras tiel efike pro Esperanta movado kaj interkompreniĝo inter la popoloj. Kiel esperantisto mi estas dankema pro via

Al "El Popola Ĉinio"

(AKROSTIKE, JE ĜIA 35-JARA DATREVENO)

Eposon puntsimilan mi ekveftus per via voĉo varma:
Lumoradia estus ĝi, ebria je l'datreveno ĉarma.

Potenca estas via sorĉ' sincera sur l'Internaciulojn.

Orient-orgen' lulanta nian vivon per notoj simfoniaj,
Patrolante l'etoson de l'Movado ĉiujn mondangulojn,
Ornamante la paĝojn per koloraj artverkoj papiljaj.

Levu kurtenon novan sur alian

Ambician programon galaksian.

Ĉiziĝu nun sur la memortabulon la honorinda krono

Interpretante nian dankesprimon pro la kulturdigesto

Nektara, nebremsebla. Estu via aper', nia bombono.

Imunu vin kontraŭ la maliculoj kun fierem-modesto,

Oaz-aroma rifuĝej' por nia plurjara Esperfesto.

24.5.85.

Carmel Mallia (Malto)

intensa laboro kaj deziras al vi
longan vivon kaj daŭrigon dum
multaj jaroj de nia revuo.

Pio Moa Banga (Hispanio)

Antaŭ ĉio, permesu ke mi klarigu al vi, ke mi estas jam veterana esperantisto, ekde la jam longa jaro 1932a, kiam mi legis por la unua fojo ion pri la ekzistado de internacia lingvo Esperanto. De tiam, mi fariĝis esperantisto.

Vi povas, do, kompreni mian entuziasmon rilate al tiel grava

Jubileo, kia la 35-a jaro de "El Popola Ĉinio". Vere, mi posedas iujn de la unuaj tempoj, de tie ricevitajn, presitajn sur malbonkvalita papero. Tamen, hodiaŭ, post 35 jaroj, jen "El Popola Ĉinio" ŝanĝiĝis en belegan revuon, kun speciala papero kaj kolor-ilustritaj paĝoj, sur kiuj ni povas estimi kaj taksu la ĉinan arton de la momento.

Kio gravas, tamen, en ĉi tiu momento estas la floroj, kiujn vi rikoltas post longdaŭra batalado.

Wilson Veado (Brazilo)

Tarifo: 1 internacia respondkupon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage agerigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Anoj de paperfabrika E-klubo korespondus kun sama E-klubo el Ĉinio. Deziras ni ŝanĝi spertojn kaj fondi fratan rilaton. Szolnoki Papirgyar E-Klubo, Szolnok, Poŝtfako 12, H-5004 Hungario.

* S-ano Eros Blasio (28j.) volas fondi esperantan familion kun serioza s-anino (20-35j). Resp. garantiata. Szolnok, poŝtfako 9. H-5006, Hungario.

* Kadre de la 71a Universala Kongreso franca organismo, kiu jam rilatas kun komercaj ĉambroj kaj franca komerca ministro, deziras starigi intersanĝon kun ĉinaj komercistoj kaj industriistoj kiuj emus profesie uzi Esperanton. Rapidan respondon atendas komerca fako de Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, France.

* Gu Yingling, Kun-Shan Chemical Works, Jiang Su, Ĉinio, dez. kor. kun inĝeniero pri kemia industrio, speciale el USSR, Pollando, Ĉeĥoslovakio, DDR, ktp.

* Infanoj en sveda kristana dimanĉa lernejo deziras ricevi salutkartojn el alilandaj infanoj okaze de Kristnasko 1985. Ni garantias respondon al ĉiu skribinto. Gepatroj, geinstruistoj! Estu afablaj stimuli kaj helpi la infanojn skribi al: Dimanĉa Lernejo de Savedalen, Poŝtfako 2077, S-433 02 Partille Svedio.

VOJAĜO EN JUGOSLAVIO

INTERNACIA KONFERENCO

En la lasta tagdeko de marto, invitive de la Komunuma Konferenco de Kroatia Esperanto-Ligo Osijek, Jugoslavio, en la nomo de Radio Pekino mi partoprenis la internacian konferencon de plurlandaj esperantistoj-radio-laborantoj. Ĝi estis okazigita de Osijek-aj esperantistoj memore al elstara esperantisto de la urbo kaj ĵurnalisto, s-ro Ivan Flanjak, kiu faris grandan kontribuon al Esperanto. Bedaŭrinde, malsano tro frue forprenis lian vivon. Antaŭ du jaroj, je la unua datreveno de lia forpaso, oni okazigis la unuan internacian konferencon kun la temo: Ĵurnalismo kaj Literatura Kreado en Esperanto. Kaj tiu ĉi estas la dua konferenco kun la temo: Esperanto en Radio.

La konferencon ĉeestis ankaŭ reprezentanto de Radio Polonia s-ro Jerzy Uŝpienski, de Radio Zagrebo de Jugoslavio s-ino Emilija Lapenna kaj ĉ. 100 radio-redaktoroj, ĵurnalistoj, verkistoj kaj radio-amatoroj el Pollando, Hungario kaj Jugoslavio. Inter ili estis fama turisto mondvojaĝanto Tibor Sekelj, sekretario de la Jugoslavia Esperanto-Ligo, Djordje Dragojloviĉ, sekretario de la Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj Duŝan Adnadj. Respondeculoj aŭ redaktoroj de la Esperanta redakcio de iuj radiostacioj sendis skribajn parolojn. Interŝanĝo de spertoj inter kolegoj, renkontiĝo de radio-laborantoj kaj aŭskultantoj certe akcelos la disvolviĝon de la Es-

peranta radioelsendo. S-ro Zeljko Huber, la urbestro de Osijek, honoris la konferencon per sia akcepto.

EN SUBOTICA

Laŭ la kompleza invito de niaj aŭskultantoj mi faris agrablan vojaĝon en la urbo Subotica ĉe la norda landlimo de Jugoslavio, Borovo, Zagrebo, la ĉefurbo de la Kroatia Respubliko, Rijeka kaj Pula ĉe la bordo de Adriatiko, kaj fine mi flugis al Belgrado. En tiu vojaĝo mi sate rigardis la ĉarmajn pejzaĝojn de Jugoslavio kaj estis varme akceptita de diverslokaj esperantistoj.

Subotica, antikva kaj kvieta urbo kun nur 100 000 loĝantoj, estis la unua etapo de mia vojaĝo.

Mi veturis al la loko kiel gasto de nia aŭskultanto s-ro Tibor Sekelj. Li vojaĝis en 90 landoj de kvin kontinentoj por fari esploradon kaj enketadon. Li ne estas montogrimpisto, tamen konkeris plurajn montpintojn, inkl. de la montpinto Akonkagvo 7 000 metrojn super la marnivelo. Li estis honorita de la argentina registaro per la plej alta premio "Ora Kondoro" kaj elektita kiel membro de la Brita Reĝa Geografa Societo kaj prezidanto de la Internacia Geografa Asocio. En la Esperantujo li ĝuas bonan reputacion. Li estas komitatano de la Universala Esperanto-Asocio kaj prezidanto de la Esperantlingva Verkista Asocio. Kiel vojaĝisto, li tre malofte restas hejme. Estis

granda honoro por mi, ke mi havis okazon gastigi ĉe li.

La domo de Tibor Sekelj impresas kiel muzeo. Ĝi havas tri ĉambrojn kun ĉ. 100 kvadrataj metroj. Ĉie en la ĉambroj estas metitaj specimenoj de li kolektitaj, inter kiuj estas diversnaciaj ĉapoj, maskoj, muzikiloj, diskoj, sonbendoj kaj ankaŭ libroj en diversaj lingvoj. Nur ĉe la malgranda angulo de ĉambro estas lia tre modesta lito.

Li informis al mi pri la celo kaj plano de la Esperantlingva Verkista Asocio, en kiu li laboras, pri liaj spertoj kaj liaj opinioj pri propagando kaj disvastigo de Esperanto en la tria mondo. Tie mi renkontiĝis kaj intime interparolis kun 50 samideanoj.

EN RIJEKA

Adiaŭinte Zagrebon mi veturis suden. Kiam mi atingis la marbordan urbon Rijeka, akceptis min veteranaj esperantistoj Mehmed Jakupoviĉ kaj Radoslav Ŝkalamera. Ili prezentis al mi bukedon da floroj.

Tie mi ĉeestis la jarkunvenon de la tieaj esperantistoj. En la kunveno elementlernejanoj prezentis en Esperanto diversajn programerojn, kiaj deklamo de poemoj, ĥoro kaj solkanto. Veteranaj esperantistoj faris resumon pri laboro de la asocio kaj ellaboris planon de la sekvanta jaro. Tie mi renkontis s-inon Zora Zic, kiu ĉeestis la kunvenon malgraŭ sia malsano. Mi havis amikan interparolon kun ŝi.

En la sekvanta tago, kiam mi vizitis la urbon akompanate de la gastiganto, iu maljuna esperantisto de la urbo Split manpreman- te kun mi demandis, ĉu mi bon- volus renkontiĝi kun la pasaĝeroj en ilia turisma aŭto kaj interpa- roli kun ili almenaŭ kelkajn mi- nutojn. Mi ĝoje konsentis kaj sekvis lin en la aŭton. Mi salutis ilin Esperante kaj ĉine. Iu mal- junulo en la aŭto salutis la labo- rantojn de Radio Pekino en la nomo de ĉiuj pasaĝeroj. Ni de- ziris bonvojaĝon unu al alia kaj mansvingis por adiaŭi.

KUN AMIKOJ DE PULA

La pitoreska urbo Pula ĉe la bordo de Adriatiko estas fama turisma loko de Jugoslavio. Tie mi vizitis d-ron Ivo Boroveĉki, nian malnovan aŭskultanton kaj estron de la Hospitalo de la Medi- cina Centro Pula. Li komencis lerni Esperanton en 1940, laboris kiel prezidanto de la Jugoslavia Esperanto-Ligo, organizis la 38-an Universalan Kongreson de Esperanto oka- zintan en Zagrebo en 1953 kaj samjare iniciatis Esp-radioelsen- don en Radio Zagrebo. Kiel re- prezentanto de esperantistoj li estis akceptita de prezidanto Tito.

D-ro Ivo Boroveĉki komencis memlerni la ĉinan lingvon en la sesdekaj jaroj, nun li povas pa- roli en la ĉina lingvo. Li ŝatas historion, kulturon, filozofion de Ĉinio, precipe ĉinajn klasikajn poemojn. Li kolektis multajn ĉinajn metiartaĵojn, kaligrafiaĵojn, pentraĵojn, diskojn, diversling- vajn librojn pri Ĉinio kaj famajn ĉinajn literaturaĵojn. Li havas multe da ĉinaj amikoj. En liaj du vizitlibroj estas skribitaj ami- kaj kontaktoj inter li kaj divers- rondaj ĉinoj.

Li ofte aŭskultas nian radioel-



En la nomo de Radio Pekino la aŭtoro akceptas al- bumon de s-ro Zeljko Huber, la urbestro de Osijek.

sendon kaj tenas intiman rilaton kun ni.

Tie mi renkontis ankaŭ Tomi- slav Plaĉkoviĉ, peranton de ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj en Jugosla- vio. Dum pli ol dek jaroj li faris grandan penadon por distribui ĉinajn eldonaĵojn. Ĉi-foje li ĝoje donis al mi adresojn de novaj abonantoj kaj petis min trans- doni ilin al la Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN) por ilia enaboniĝo.

MALNOVAJ AMIKOJ EN BELGRADO

De Pula mi flugis al Belgrado. Kamaradino Branka Boškoviĉ bone aranĝis por mi la tagordon. Ankaŭ ŝi estas peranto de ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj en Jugoslavio. Ni kiel malnovaj ami- koj faris korverŝan interparolon ĉe la renkontiĝo. Mi vizitis la kompanion, kie ŝi laboras. Dank' al ŝia klopodado la kompanio ha- vas bonan rilaton kun Ĉinio.

Ankaŭ Joĉjo Ĝuriĉ, nia mal- nova aŭskultanto, varme akcep- tis min. Li estas fervora kaj vigla

junulo. Akompanate de li, mi vizitis la memorhalon de Tito kaj promenis en la bela urbo. Tie la kontraŭfaŝismaj monumentoj en diversaj lokoj kaj memortabuloj sur konstruaĵoj priskribas la bra- van kontraŭfaŝisman batalon de la jugoslava popolo kaj donas ne- forgeseblan impreson.

Mi renkontiĝis ankaŭ kun ve- teranaj esperantistoj. Ili ludis gravan rolon en la jugoslava Esperanto-movado kaj hodiaŭ ili kiel antaŭe partoprenas en la Esperantaj aktivecoj.

La supre diritaj estas nur frag- mentoj de mia vojaĝo. Ankoraŭ multaj varmaj renkontiĝoj pro- funde impresis min kaj multaj ĉarmaj pejzaĝoj min ravis. En Osijek mi estis invitita al la fami- lia renkontiĝo de iu juna laboris- to. En Borovo mi havis intiman intervjumon kun Duŝan Adnadj, la ĉefredaktoro de la jugoslavia Esperanta gazeto "Voĉo". En Za- grebo mi vizitis la ekspozicion de ĉinaj antikvaj metiartaĵoj dedi- ĉitaj de Ante Topiĉ Mimara. La tieaj amikoj kaj feliĉaj renkonti- ĝoj eterne restos en mia memoro.

Du majstraj tradukoj poeziaj

LA ROBAIOJ DE UMAR KAJJAM trad. G. Waringhien. Dua eldono reviziita kaj plivastigita. Formato: 14.6 × 20.8 cm. 107 p. Prezo: 12.00 gld., triona rabato ekde 3 ekzempleroj. Havebla ĉe la libroservo de UEA.

En 1953 aperis la Esperanta traduko de G. Waringhien "Poemoj de Omar Kajjam", kiun mi ne havis la feliĉon legi; kaj en 1980 aperis alia Esperanta versio de versaĵoj de U. Kajjam el la plumo de W. Auld, titolita per "La Robaĵoj de Omar Kajjam", ankaŭ kiun mi ne povis vidi. Tiu ĉi nova traduko enhavas 211 verskvarojn, numeritajn kaj klarigitajn per pli ol cent notoj de la tradukinto. Facile oni povas flarsenti la pesimismon de U. Kajjam (1040—1123 p. K.) en lia filozofio pri la vivo kaj morto, legante liajn robaĵojn. Li kantis en n-ro 5:

Se tion diri simple, senmetafore,
ni
estas ŝakpecoj, kiujn priludas
mondgeni';
kaj ni, post eta rolo sur la ta-
bul' de 1' vivo,
revenas unuope en keston de 1'
Neni'.

kaj en n-ro 117:

Ĉiela volb', sub kiu ni staras sen
memrego,
similas mem al ia magia lanter-
nego:
kandel' estas la suno, ekran' la
universo,
kaj ni la bildoj, kiuj rondiras,
vana grego. . .

U. Kajjam rimarkigas al ni, ke la morto egaligas ĉiujn sendistinge

pri iliaj rangoj kaj meritoj, ekz. en n-ro 169:

En unu potfarejo haltigis min
obsedo:
ĉe l' tornad' la mastro per lerta
argilknedo
aŭdace faris anson kaj kolon de
vinkruĉo
al reĝkrani' miksita kun almo-
zulpiedo.

Foje la poeto predikas ankaŭ pri frateco, kiel en n-ro 156:

En la bazar' hieraŭ mi staris ĉe
potisto,
kiu argilon freŝan knedadis kun
persisto;
kaj la argilo diris en sia muta
lingvo:
"Kiel vi mem mi estis: ha! min
ne traktu mis do!"

Lia versaĵo eĉ montras deziron ŝanĝi la mondon maljustan, tamen tio ne estas la ĉefa melodio lia. Ekzemple n-ro 123 diras:

Se, kiel Di', mi havus en manoj
la ĉielon,
mi tuj disrompus tiun fuŝitan
pramodelon,
kaj mi tutnovan mondon elfarus
laŭ ĉi plano,
ke kor' sincera povu atingi sian
celon.

La poeto klare esprimas sian mal-
kontenton kaj nekredon je Dio
ĉiopova. Li kantas en n-ro 49:

Ho Majstr', kiu kunmetis 1'
erojn de 1' homa skulpto,
kial ĝin ruinigi sen ia preĝ-aŭs-
kulto?

Se estis ĝi senmanka, pro kio do
ĝin rompi?

Kaj, se ĝi malperfektis, konfesu:
kies kulpo?

Lia ribelemo kontraŭreligia mon-
triĝas ankaŭ en n-ro 165:

Ribela, mi? — Sed kie via potenc'
sen baro?

En mia kor' noktiĝas? — Sed kie
via klaro?

Edenon vi donacas al viaj obean-
toj?

— Sed estas interŝanĝo: kie via
bonfaro?

Li ne kredis je Dio, tamen sentis
la potencon de la religio kaj per
skeptikaj demandoj malkovras la
falsecon de religiaj doktrinoj.
Ekzemple, li skribis en n-ro 163:

Kiam Alah' nin kreis el humo
de la tero,
li sciis, kion nepre ni faros, sen
libero;
jam ĉiujn niajn pekojn decidis
Lia klero:

do, ĉe la Fina Juĝo, pro kio ĉi
Infero?

Simile al ĉinaj poetoj antikvaj,
malfavorataj en sia tempo, U.
Kajjam multe sindonis al ŝato de
vino, ĝin prikantis kaj trovis en
ĝi preskaŭ savon el la mizero de
la kurta vivo surtera. Li kantas
en n-ro 17:

Se eble, havi bulon da purtri-
tika pano,

ŝafidan klabon, kruĉon da vino
ĉe la mano,

kaj sidi ambaŭ en la soleco de
1' Ruinoj:



jen ĝu' ekster atingo de iu ajn
sultano.

Li eĉ diris en n-ro 24:

Kiam en tomb' de miaj esperoj
Sort' min tretos,
kaj min, senplumigitan birdeton,
Mort' forĵetos,

zorgu: el mia cindro vi modlu
unu tason.

Eble, kiam ĝi plenos de vin', mi
revivetos. . .

En formo la robairoj similas al la
ĉinaj klasikaj versaĵoj *jueju*
(elp.: ĝjŭe-ĝju) en Tang-dinastio
(618-907 p. K.), kaj iuj esploran-
toj eĉ supozas, ke ekzistis iaj

rilatoj inter la persaj robairoj kaj
la ĉina *jueju*. Ĉu vere? La bela
traduko el la majstra plumo de
G. Waringhien ebligas al la espe-
rantistaro havi pli bonan konon de
la mondfama poezia verko de U.
Kajjam. Do multaj profitu el lia
laboro diligenta.

JOHANO LA BRAVA de Sán-
dor Petöfi, tradukita de K. Kaloc-
say. Kvara eldono fare de la
Hungara Esperanto-Asocio kun
artikolo de V. Benczik "Pri la
verko kaj ĝia aŭtoro". Formato:
14 × 20 cm. 60 p. Prezo: 11 gld.

Kontraste al la versaĵoj de U.
Kajjam, tiu ĉi popolfabelo en
versoĵoj de la hungara patriota poe-

to Sándor Petöfi estas plena de
optimismo. Ĝi priskribas la mal-
facilan vivon de malriĉaj popola-
noj, prikantas ilian fidelecon en
amo, bravecon en batalo kontraŭ
malfaciloj, simpatio al suferantoj
kaj deziron de paco kaj feliĉo.
Kiam mi legis la unuan eldonon
de la traduko de K. Kalocsay
antaŭ 40 jaroj, mi trovis ĝin si-
mila al kantrakonto de migrantaj
rakontistoj en mia hejmvilaĝo en
Norda Ĉinio. En 1948 K. Kaloc-
say plibonigis sian tradukon per
zorga tralaboro kaj ĝin reaperigis.
Nun venas la kvara eldono de lia
majstra Esperanta versio. Tio
montras, ke ĝi estas ŝate akcep-
tata de la legataro, ke ankoraŭ
ne forvelkis la poezio de la
esperantistoj.

Estas aparte menciinde, ke an-
taŭ duona jarcento, "Johano la
Brava" estis ĉinigita de s-ro Sun
Jong pere de Esperanto kaj aperig-
ita en la gazeto Ben Liu (To-
rento), sub zorgo de ĉina eminenta
verkisto Lu Sin, kiu favoris al
Esperanto. La ĉinan version oni
ilustris per faksimiloj de raraj
koloraj freskoj, kiujn K. Kalocsay
alsendis speciale por la ĉina
eldono. Kredeble ekzistas ankaŭ
aliaj ilustraĵoj por tiu ĉefverko de
S. Petöfi. Kial do ne aldoni ilus-
traĵojn indajn ankaŭ al la Espe-
ranta versio? Ankoraŭ pli bela
estos tiu versaĵo fabela kun plaĉaj
ilustraĵoj, ĉu ne? Kaj sen ilustraĵoj,
la libro lasas al nia imago flugi
tute libere, do ankaŭ bone.

Recenzis Laŭlum

(Daŭrigo de p. 42)

fruktarbaron. Ŝi kaŝis en la koro
la dolorojn de la malfacila akuŝo
kaj morto de la bebo, por ke la
edzo senzorge laboru ĉe la land-
limo.

Tiu ordinara ĉina virino, ed-
zino de landlima armeano, bone
scias sian respondecon. Ŝi diris:

"Mi preferas mem multe suferi
por ke oni laŭdu lin."

Ĝeng Gujfen vere estas laŭ-
dinda. En 20 jaroj ĉe la landlimo
li fidele plenumis sian taskon,
akompanate de radaro, neĝo kaj
glacia rivero.

En 1980, ili transloĝiĝis al la
landlimo. Li Janŝja fariĝis labo-

ristino de vinofarejo. La geedzoj
tie silente eklaboris kaj ekvivis.

Finiĝis la raportado, sed en la
kunvenejo regis silento. Ŝajnis,
ke la aŭskultantoj ankoraŭ ion
rememoras. Jes, la homoj, kiuj
dediĉis sian junecon kaj intelek-
ton al la landlimo de sia patrujo,
estas brilaj steloj neniam mallevi-
ĝantaj en la koro de la popolo.

“ANGULO DE ESPERANTO”

Por kontentigi la deziron de amantoj de Esperanto, la E-asocio de Ĉongĉing, granda urbo en la sudokcidenta Ĉinio, la 23-an de junio ĉi-jare okazigis la Esperantan aktivadon “Angulo de Esperanto” en Pipaŝan-parko de la urbo.

De la lastaj jaroj la E-movado de la urbo progresas kun granda rapideco, precipe post kiam la Ĉina Esperanto-Ligo donis la pokalon “Fyne” al la Ĉongĉing-a E-Asocio en la 3-a Tutlanda Laborkunsido de Esperanto en la pasinta jaro, aperis en Ĉongĉing nova tajdo de lernado de Esperanto. Pli kaj pli multaj homoj lernas Esperanton en koresponda, radioelsenda kaj aliaj E-kursoj. Ĉar la plejparto el ili lernas Esperanton en la post-labora horo, ili esperas, ke, se eble, oni respondos iliajn demandojn.

Guste pro tio ekfunkciis la “Angulo de Esperanto”. En ĉiu dimanĉo amantoj de Esperanto kuniĝas, parolas Esperante kaj interŝanĝas lernospertojn. Kaj samtempe laborantoj de la E-Asocio de la urbo donas al ili helpan lecionon. Partoprenis en la unua aktivado de la “Angulo de Esperanto” pli ol 100 personoj.

ESPERANTO EN ELEMENTA LERNEJO

La lernejoj de la unua klaso de la elementaj lernejoj Honggŭang kaj Popola Placo de la urbo Ĉangĉun en nordorienta Ĉinio lernas Esperanton po du horoj ĉiu-dimanĉe.

La Porgeknaba E-kurso iniciatita de la Ĉangĉun-a E-Asocio kaj la Urba Oficejo de Porgeknaba Edukado ekfunkciis en la mezo de junio en la “Edeno de Plantidoj”

de la Porinfana Parko de la urbo. La 11-an de julio la televidostacio de Ĉjilin-provinco raportis pri la kurso.

ESPERANTO-KURSO EN RADIO

La Popola Radiostacio de Huhhot de la Interna Mongolio ekfunkciigis E-kurson en sia radio ekde la 5-a de julio ĉi-jare.

Tri junaj geesperantistoj donas lecionon kvar-foje ĉiusemajne po duonhoro.

La E-kurso en radio estas bona al multe da amantoj de Esperanto. Ĝiaj aŭskultantoj estas elementlernejoj, mezaĝaj kaj maljunaj intelektuloj. Kunlabore kun la kurso, la urba E-asocio fondis konsultejon por solvi iliajn malfacilojn en lernado.

LA E-KOMISIONO SUB LA TRADUKISTA ASOCIO DE ĈINGHAJ-PROVINCO FONDITA

En junio la Tradukista Asocio de Ĉinghaj-provinco okazigis sian

plivastigitan kunsidon de konsilantoj. La konsilantoj donis multe da opinioj pri la reforma laboro de la Tradukista Asocio. Post diskutado la Konstanta Komitato de la konsilantaro de la asocio decidis fondi E-komisionon sub la Tradukista Asocio de Ĉinghaj-provinco, kies estro estas Tang Ĝongjan, membro de “Amikoj de Esperanto” kaj profesoro de la Ĉinghaj-a Normala Universitato, kaj kies sekretario estas Ĝja Ŭende. Bv. skribi al: He Ming, la vestofarejo de Hŭangĝong-gubernio, Ĉinghaj-provinco.

SUKCESO DE INVALIDO EN EKZAMENO DE ESPERANTO

En la urbo Smederevo, Jugoslavio troviĝas centpocenta invalido Pavloviĉ BOGDJUB-DISKO, kiu povas movi nek brakojn nek gambojn kaj estis katenita al la lito dum 10 jaroj. Dank’ al flegado de sia edzino kaj helpado de sia amiko inĝ. Milorad ĜURĜEVIĈ, konstanta kursgvidanto, li komencis lerni Esperanton ekde la 27-a de februaro 1985. Nur post tri monatoj kaj tri tagoj li

Esperanto-kurso por geknaboj en Ĉangĉun



faris sukcesan ekzamenon en la 2-a de junio. Li duoble pli longe faris la buŝan parton de la ekzameno, ĉar li ne povis skribi. Kiam li finis la ekzamenon, la kandidatoj kaj gastoj spontanee kaj longe aplaŭdis pro lia bonega sukceso.

JUBILEO DE ESPERANTO-MONUMENTO

Por la 50-jara ekzistado de la Esperanto-monumento en Den Burg, sur la insulo Texel (Tekselo), Nederlando, la komitato de Esperanto-grupoj de Den Helder kaj Alkmaar organizis je la 1-a kaj 2-a de junio jubilean semajnofinon, en kiu pli ol 30 esperantistoj partoprenis. S-ro F. Winkel, prezidanto de Federacio de Esperanto-organizoj en Nederlando, faris paroladon. Li diris, ke la monumento estis starigita antaŭ la Dua Mondmilito laŭ la iniciato de la fama esperantisto S-ro Joh Duinker sur Tekselo kaj la unua briko estis metita de la tiama urbestro De Poort. La monumento estas daŭra atesto de la Esperanto-ideo dum kelkaj dekoj da jaroj



S-ro Pavloviĉ Bogoljub-Diŝko (meze sidanta) kaj aliaj kursanoj


kaj ĝi eble ludos centran rolon dum la cent-jara ekzistado de Esperanto en 1987.

ALVOKO DE ESP GRUPO EL BYDGOSZCZ

La Esperanto-Klubo el Bydgoszcz, Pollando, organizas hel-

pon al niaj fratoj en Etiopio. Kiam vi volas helpi, bonvolu sendi al Bydgoszcz bildkartojn, poŝtmarkojn, albumojn, librojn, glumar-kojn, kaj tiujn aĵojn, kiujn oni povas vendi al junularo. La adreso: Esperanto-Klubo, Vi Liceum Ogólnokształcące, ul. Staszica, BYDGOSZCZ, Pollando.

La pinto de la monumento kaj la partoprenantoj ĉe la monumento



Pri la sanprotekto de la virinoj kaj infanoj en la ĉina kamparo

de MEJ ĜI

La laboro pri la sanprotekto de la virinoj kaj infanoj en la ĉina kamparo komenciĝis kompare malfrue kaj kelkfoje estis malhelpata kaj eĉ ĉesigita. Sed kia estas ĝia nuna stato?

LA NOVA AKUŜIGADO FUNDAMENTE POPULARIGITA

La higiena laboro por la virinoj kaj infanoj en la ĉina kamparo komenciĝis de popularigo de la nova akuŝigado. En la malnova Ĉinio la kamparanoj ofte suferis de malsato kaj ne havis monon por viziti kuraciston pro la postĝintaj ekonomio kaj kulturo. La akuŝantinoj kun kompare bonaj kondiĉoj venigis akuŝistinojn al sia hejmo por akuŝigo,

kaj la aliaj povis nur mem zorgi pri tio. La postĝintaj kurackondiĉoj kaj malnova akuŝigado kaŭzis morton al granda nombro da akuŝantinoj kaj novnaskitoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la ŝtataj higienaj departementoj antaŭ ĉio elkulturis grandan nombron da akuŝistinoj en la urbo kaj kamparo tra Ĉinio kaj popularigis la novan desinfektan akuŝigadon. Nun en la vasta kamparo de Ĉinio preskaŭ ĉiu vilaĝo havas unu trejnitan kuraciston, kiun la gubernia higiena departemento provizis per akuŝigsako kun desinfektaj akuŝigaj instrumentoj. Nun per la nova metodo oni akuŝigas 93% de la akuŝantinoj en la tuta lando kaj 92% en la kamparo.


SANPROTEKTA RETO POR LA VIRINOJ KAJ INFANOJ FORMITA

En la ĉina kamparo jam fundamente formiĝis sanprotekta reto por la virinoj kaj infanoj de tri niveloj, starigita laŭ la ĉinaj administrataj strukturoj, t.e. la gubernio havas sanprotektan stacion, la subdistrikto sanitarejon kaj la vilaĝo kuraciston. En Ĉinio la virinoj kaj infanoj konsistigas du trionojn de la 1.03 miliardoj da loĝantoj. Por bone fari sanprotektan al tiel multaj loĝantoj, estas efika la sanprotekta reto por la virinoj kaj infanoj de tri niveloj. Ĝi elkulturis al la kampara sanprotekta laboro por la virinoj kaj infanoj sufiĉe grandan nombron da fakuloj.

Regula korpo-ekzamenado en infanĝardeno



Medicinistinoj gvidas infanojn en okul-protekta ekzercado.



Du normoj de la sanprotekto de Ĉinio estas proksimaj al la niveloj de la evoluantaj landoj. Unu el ili estas mortokvanto de la infanoj, kiu malleviĝis de 20% antaŭ la Liberiĝo al 3.468% en 1981. La alia estas mortokvanto de la gravedulinoj kaj akuŝantinoj, kiu malleviĝis de 1.5% antaŭ la Liberiĝo al 0.05%. Tiuj ĉi ciferoj bone pruvis la efikon de la tri-nivela sanprotekta reto por la virinoj kaj infanoj en Ĉinio.

PRAKTIKADO DE LA LAŬPLANA NASKOLIMIGO

En la 70-aj jaroj Ĉinio ekpraktikis laŭplanan naskolimigon. Antaŭe la vilaĝaj virinoj naskis multe kaj neregule, kaj krome, ili ne povis bone ripozi post la akuŝo kaj la infanoj ne havis sufiĉe da nutraĵoj. Tio multege malutilis al la sano de la virinoj kaj infanoj. Tial la laŭplana naskolimigo sendube havas pozitivan influon sur la sanon de la virinoj kaj infanoj.

Samtempe kun tio, Ĉinio propagandas eŭgenikon. Tio celas

intensigi la sanprotektadon de la virinoj kaj infanoj. Nun la sanprotektaj organizaĵoj de la virinoj kaj infanoj ne nur liveras preventilojn kaj faras steriligan operacion al la naskipovaj geedzoj, sed ankaŭ faras eŭgenikan konsulton, fizikan ekzamenon antaŭ geedziĝo, konsulton pri heredeco, ktp.

Krome, por garantii la sanon de la patrinoj kaj infanoj kaj altigi la kvaliton de la loĝantaro, de post 1978 la gravita punkto de la sanprotekto de la virinoj kaj infanoj en la ĉina kamparo transiris de popularigo de la nova akuŝigado al pli alta etapo, t. e. la virinoj ricevas sisteman prizorgon kaj kontroladon tuj post sia gravediĝo. Oni provas puerperan sanprotektadon unue en parto de la urboj kaj vilaĝoj, kaj disvastigos ĝin en la vasta kamparo de Ĉinio post kiam oni akiros sperton tiuflanke. Ekz. la sanprotektata stacio por virinoj kaj infanoj en Ŝunji-gubernio, Pekino, donas sisteman prizorgadon al la virinoj gravedaj de pli ol 12 semajnoj. La vilaĝaj kuracistoj antaŭ ĉio

devas havigi sankarton al ĉiuj gravedulinoj. La subdistriktaj kaj vilaĝaj kuracistoj periode ekzamenas al ili la korpon por fari ĝustatempan kuracon. Surbaze de tio, multaj guberniaj sanprotektaj stacioj faras kontroladon kaj prizorgadon al danĝeraj gravedulinoj. Farante ĝeneralan ekzamenon por la gravedulinoj, la vilaĝaj kuracistoj registras la koeficientojn por ili laŭ la normo de danĝeraj koeficientoj difinita de la higienaj departementoj kaj faras specialan flegadon al la gravedulinoj kun altaj koeficientoj. Ili unuflanke raportas tion al la tuj supera sanprotekta organizo por la virinoj kaj infanoj, aliflanke ili ĝustatempe kuracas ilin kaj proponas al ili akuŝejon kaj akuŝigmanieron. En antaŭurbo de Pekino iu gravedulino suferis je diabeto, pro tio mortis ŝia unua bebo. Kiam ŝi gravediĝis denove, la vilaĝa kuracisto ĝustatempe veturigis ŝin al la urba hospitalo, kaj la bebo estis facile naskita.

FERVORA SERVADO

La medicinaj kaj sanitaraj la-

Kurso por trejni medicinistinojn por protekti la sanon de virinoj kaj infanoj en kamparo





Medicinstinoj en sanitara servo

borantoj komencas sian prevent-sanprotektan laboron al la infanoj tuj post ilia naskiĝo. Tio estas, registri sur karto la sanstaton de la beboj de ties naskiĝo ĝis 7 jaroj, fari fizikan ekzamenon por ili kaj injekton al ili per vakcinoj de BCG kaj bovino, serumo kontraŭ difterio, kokluŝo kaj tetano, vakcinoj kontraŭ morbilo, poliomyelito kaj B-tipa encefalito.

Ĉi-jare en parto de la vilaĝoj en Ĉinio praktikiĝis familia vizito. La 2-an, 7-an, 15-an kaj 28-an tagojn post la naskiĝo de la beboj, la sanitaristoj vizitas iliajn hejmojn por ekzameni ilian sanstaton. En iuj lokoj tiu sistemo jam ricevis bonan efikon. En Ŝjaŭdjan-subdistrikto de Ŝunji-gubernio iu bebo senĉese ploradis en la dua tago post sia naskiĝo. Ĝiaj gepatroj ege maltrankviliĝis, sed ne sciis, kion fari. La sanitaristo ĝustatempe vizitis ĝian hejmon kaj trovis, ke la bebo havas febron de 39.7°C. Ili

tuj sendis la bebon al la gubernia hospitalo kaj tiel ĝi estis savita el danĝero. Ĝia patrino diris kun dankemo, ke la bebo ne evitus danĝeron, se la sanitaristo ne vizitus ĝian hejmon.

Samtempe kun tio, la sanitaristoj donas konsilojn al la akuŝantinoj pri nutrado de la beboj per sciencaj rimedoj. Iuj akuŝantinoj ne povas nutri la bebon per sia lakto, la vilaĝaj kuracistoj do instruas al ili prepari surogaton.

En Ĉinio oni senescepte sentas, ke la sanitaraj kuracistoj por la virinoj kaj infanoj servas pli fervore ol aliaj kuracistoj. Krom la supre diritaj servoj, ili ankorau serĉas veturilojn por sendi malsanajn virinojn kaj infanojn al hospitalo. Al la gravedulinoj, kiuj ne volas esti ekzamenataj aŭ ne havas taŭgajn kondiĉojn por naski pro kronika aŭ hereda malsano, ili devas kun granda pacienco fari konsolojn kaj klari-

gojn. Ginekologino-obstetrikistino profesoro Jan Jenjing, malgraŭ sia grandaĝeco, ĉiutage laboras. Ŝi diris, ke ordinare malsanulo vizitas kuraciston, sed la sanitaraj kuracistoj por la virinoj kaj infanoj devas iri en la amasojn por sia servo, kompreneble, ilia servado nepre devas esti iniciatema kaj fervora.

MALFACILOJ

Ekde 1979 la ĉina registaro faris serion da ekonomiaj reformoj en la kamparo, la kampara ekonomio vigliĝis kaj la kamparanoj riĉiĝis iom post iom. La pliboniĝoj de la ekonomiaj kondiĉoj kaj altiĝo de la kultura nivelo ŝanĝis la sintenon de la kamparanoj al serio da problemoj, kiaj nasko, ekzamenado kaj kuracado de la virinaj malsanoj, nutrado de beboj per sciencaj metodoj. Antaŭe ili kontentiĝis nur pri facila akuŝo kaj bonstato de la patrino kaj infano, sed nun ili deziras, ke la infanoj estu sanaj kaj saĝaj. Multaj gravedulinoj iras al sanitarejoj por sin ekzameni kaj demandi pri iuj scioj pri gravedeco. En Jujaŭ-gubernio, Ĉeĝjang-provinco, 35 vilaĝoj stariĝis sanprotekan vesperan lernejon por la virinoj kaj infanoj. Pli ol 2 000 junulinoj partoprenas en la lernado. Ankaŭ tiuj, kiuj antaŭe ne volis ricevi fizikan ekzamenon, propravole vizitis hospitalon por sin ekzameni. Multaj gravedulinoj petis akuŝi en hospitalo. Evidente, sanprotektado de la virinoj kaj infanoj ne plu estas malfacila kiel antaŭe.

Kompreneble, aperis iuj novaj problemoj.

Pro praktikado de la ekonomia reformo en la kamparo pli da vilaĝanoj laboras super flankokupoj. Ili ofte laboras kun la tuta familio en aliaj lokoj kaj revenas

al sia vilaĝo kun nove naskita bebo post unu aŭ du jaroj. La sanitaraj kuracistoj por la virinoj kaj infanoj ne scias pri ilia sanstato kaj kompreneble estas malfacile praktiki sanprotektion al ili. Nun la koncernaj institucioj alprenas efikajn rimedojn por solvi tiun problemon.

Manko de financaj rimedoj por la sanprotekto de la virinoj kaj infanoj estas problemo ekzistanta por longa tempo, kio limigas multajn aktivadojn de sanprotekta laboro por la virinoj kaj infanoj. Kaj plie, la nunaj vilaĝaj sanitaristoj ne povas kontentigi la bezonon de la sanprotekta laboro ĉu en kvanto, ĉu en kvalito.

Krome, la enspezo de la vilaĝaj kuracistoj en iuj lokoj estas multe malpli alta ol tiu de riĉaj kamparanoj. Ĝuste kiel la estro de iu gubernia sanprotekta stacio emocie diris, la kuracistoj volas bone labori, sed ili ankoraŭ havas multajn solvendajn malfacilojn, kiaj tiuj de mono, trafiko, kurac-nivelo kaj tiel plu.

ABONU "EL POPOLA ĈINIO"!

Nun komenciĝas 1986-a abonvarba kampanjo por EL POPOLA ĈINIO. Tiuj, kiuj abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1985 10 01 ĝis 1986 02 28), ricevos Esperantan kalendaron. La abonvarbantoj ricevos ĉinstilajn memoraĵojn laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

ABONTARIFO DE EPĈ

(Ekvalidas de 1-a de Oktobro)

Lando	Valuto	1 jaroj	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	14.00	24.00	34.00
Aŭstrio	Sch	200	340	480
Belgio	BF	550	930	1300
FR Germanio	DM	30.00	50.00	70.00
Britio	£	8.00	13.60	19.00
Finnlando	Fmk	64.00	108.00	150.00
Francio	FF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	Ptas	1200	2000	2900
Italio	Lit	18000	30600	43000
Japanio	Yen	3000	5400	7500
Jugoslavio	Din.	500	900	1300
Nederlando	Gld.	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZ\$	20.00	34.00	48.00
Portugalio	Esc	1100	1800	2600
Svisio	SF	25.00	42.00	60.00
Usono	US\$	12.00	20.00	28.00
Kanado	Can\$	13.00	22.00	30.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	£	8.00	13.60	19.00
	US\$	10.00	17.00	24.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	£	5.00	8.50	12.00
	US\$	6.50	11.00	16.00



**VARBILON KAJ SENPAGAN SPECIMENON
NI SENDOS LAŬ PETO.**



Pejzaĝo de la Okcidenta Lago

VOJAĜO TRA ĈINIO

Belaj pejzaĝoj de Hangĝoŭ

de ŬEJ LJAŬ

Fotoj de LI ĈUNGENG

Hangĝoŭ, ĉefurbo de la provinco Ĝeĝjang, estas unu el la ses famaj antikvaj ĉefurboj de Ĉinio. La regno Ujĝe (907-979 p. K.) kaj la Suda Song-dinastio (1127-1279 p. K.) prenis ĝin kiel sian ĉefurbon. En la Suda Song-dinastio la urbo jam estis tre prospera de sia komerco.

Kaj nun la urbo altiras en- kaj eksterlandajn turistojn per sia aparta ĉarmo.

Hangĝoŭ allogas aparte per sia Okcidenta Lago. Legendo diras, ke antaŭ multe da jaroj, kiam dioj konkuris por kapti brillan perlon, ili perdis ĝin sur la teron, kaj la perlo fariĝis la nuna Okcidenta Lago. Kompreneble tio estas nur legendo. Tamen fakte la pejzaĝo de la lago estas tre rava.

La lago kovras 5.6 kvadratajn kilometrojn. En la forajo la akvo

kunfandiĝas kun la ĉielo kaj en la lago staras tri insuletoj Malgranda Jingĝoŭ, Huŝinting kaj Ĵuangongdun. Ĉirkaŭ la lago ornamas arbara zono kaj floroj. En la ombraj verdaĵoj sin kaŝas pavilonoj, vilaoj kaj belvidejoj. Ĉirkaŭ la lago staras dekelke da montoj kvazaŭ protektantaj la perlon. La montoj senescepte estas malpli ol 400 metrojn altaj, tamen ne mankas al ili groteskaj

rokoj, grotoj, kvietaj arbaroj kaj riveretoj. En la montoj la famaj fontoj Hupaŭ, Longĝing kaj Juĉjŭan kaj la grotoj Janŝja, Ŝujle kaj Ŝiu plibeligas la pejzaĝojn.

Ĉie ĉirkaŭ la lago estas vidindejoj. Santanjinjŭe estas unu el ili. La vidindejo konsistas el tri ŝtonaj pagodetoj apud la insuleto Malgranda Jingĝoŭ en la lago, konstruitaj en 1089 p.K. La pagodetoj globformaj altas 2 metrojn kun elipsoida ŝtona soklo kaj kalabas-forma supro. La globa korpo ornamita per reliefoj havas 5 rondajn truojn. En la Aŭtunmeza Festo, oni lumigas kandelojn interne de la pagodoj, kovras la truojn per diafana papero, kaj la milda lumo falas sur la akvon, kio impresas kiel malgrandaj lunoj. Kiam la luno levigas ĝis la zenito, la lumoj de la luno kaj kandeloj kaj la lumo reflektita sur la akvo kunfandiĝis en harmonian tuton.

Krom la dek vidindejoj apud la lago, ankaŭ la pagodo Ljuhe sur la monto Jŭelun apud la rivero Ĉjantang estas ŝatata vidindejo de turistoj. La pagodo konstruita en 970 p.K. havis 9 etaĝojn kaj lampon ĉe la supro. Ĝi tamen estis plurfoje bruligita en la historio. Ĝia lastafoja riparado estis plenumita en 1899. La pagodo kun multaj etaĝoj kaj densaj tavoloj da aleroj estis tute el brikoj kaj ligno. Ekstere ĝi aspektas 13-etaĝa, sed interne ĝi havas nur 7 etaĝojn. Spirala ŝtuparo kondukas ĝis la plej supra etaĝo. Ĉiu etaĝo havas en la mezo ŝtonan soklon kun gravuritaj dioj, homoj, floroj, birdoj kaj bestoj. Ĉe la anguloj de la alero pendas feraj tintiloj, kiuj bele sonas en vento. Sur la pagodo oni povas ĝui imponan panoramon: La larĝa rivero Ĉjantang fluas de okcidente orienten, kun fama Ĉjantang-pontego super si, kva-

zaŭ bela ĉielarko. Diversaj ŝipoj punktas la riveron.

Nordokcidente de la lago estas antikva templo Lingjin, tre fama sude de Jangzi-rivero. La templo konstruita en 326 p.K. havis en sia plej prospera tempo 9 turojn, 18 pavilonojn, 72 halojn kaj 3 000 monaĥojn. Kaj ankaŭ nun oni povas percepti la pasintan imponecon de la templo.

En la halo de Ĉiela Reĝo de la templo staras bodisatvo Skanda skulptita el sola kamforarba trunko. La valorega skulptaĵo jam aĝas pli ol 700 jarojn.

En la ĉefa halo de la templo majestas statuo de Ŝakjamunio alta je 19.6 metroj kaj skulptita el kamforligno. Sur la dorsa flanko de la halo estas fea monto kun 150 grandaj kaj malgrandaj versimilaj budho-statuoj en diversaj pozoj.

Kontraŭ la templa enirejo estas pinta monto Alfluginta. Sur la monto elstaras multaj groteskaj rokoj. Legendo diras, ke la monto devenas de Hindio.

Antaŭe sur la Alfluginta Monto estis 72 grotoj, kaj nun restas el ili nur malmultaj. Unu el ili estas groto Ŝeŝju. De kie oni povas vidi supre sur la plafono nur lumstrion. Jen la fama vidindejo Fendo da Ĉielo.

La Alfluginta Monto estas ankaŭ unu el la fontoj de grota skulpturo de la sudo de Ĉinio. En la grotoj kaj sur rokmuroj de la monto estas 330 ŝtonaj statuoj ĉizitaj en la periodo de la mezo de la 10-a jc. ĝis la komencaj jaroj de la 14-a jc. La plej alloga el la statuoj estas tiu de budho Majtreja, kiu ĉiam ridas sidante kun nudaj brusto kaj ventro. La skulptaĵo kun alta arta valoro de Song-dinastio (960-1279 p.K.) estas la plej granda statuo en la groto.

Hangĝoŭ havas centojn da vidindaĵoj. Lastatempe oni riparas la vilaon Hŭanbi sur la insulo Jŭangongdun kaj kavernon Hŭanglong en antikvecajn turismajn lokojn. Al la turistoj servas "bienmastro", "farmantoj",

Parko en somero





La bela hotelo Hūgang

“ĉambristinoj” kaj “palankenistoj” en vestoj de Song-dinastio.

La silkaĵoj de Hangĝoŭ ĝuas vastan renomon. La historio de la tiea silko-produktado estas tre longa, kaj la silkaĵoj havas altan kvaliton kaj multajn specojn. La glata unukolora sateno, la malpeza diafana krepo, la krispa kaj mola tafto. . . ĉiuj estas admi-

rindaj, kaj aparte menciinda estas la filigrana brokato, kiu glimbrilas je eta skuo.

Ankaŭ brokato estas tradicia produktaĵo de Hangĝoŭ. La silka fabriko Duĝingŝeng estas tre fama. La fabriko produktas tradiciajn multkolorajn brokatojn kaj nigra-blankajn silkajn bildojn de pejzaĝoj, personoj kaj kopioj de


la pentraĵoj de antikvaj kaj nunaj pentristoj.

Cetere Hangĝoŭ produktas bonkvalitajn silkajn ombrelojn, ventumilojn, manĝbastonetojn kaj teon.


La plej fama plado de Hangĝoŭ estas vinagrita karmo. Unue oni devas bredi la fiŝon en mal-satigo kelkajn tagojn, kaj poste ĝin purigi, kuiri en bolanta akvo kaj spici per sukero kaj vinagro. La fiŝo belkolora kaj belforma gustas kiel krabo. Partikularaj pladoj estas ankaŭ “almozula kokido”, “viandaĵo stufita laŭ maniero de Su Dongpo” (Su Dongpo estis fama poeto de Song-dinastio), “senŝeligitaj salikokoj spicigitaj per teo”, “vegetala ŝinko” k.a.

Hangĝoŭ posedas pli ol 3 000 litojn por fremdlandaj turistoj. La hotelo Hangĝoŭ tuj apud la Okcidenta Lago posedanta 600 litojn estas kune administrata de ĉinoj kaj la Singapura Financa Grupo Shangri La. La interno de la orienta domo de la hotelo estis rekonstruita kaj la servo atingos la normon por kvarstela hotelo.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Kaŝi en Sinĝjang
2. Ĉinghaj-provinco
3. Tibeta Aŭtonoma Regiono
4. Junnan-provinco
5. Gujĝoŭ-provinco
6. Fuĝoŭ
7. Ĉingdaŭ
8. Ŝanhajo
9. Hangĝoŭ



La Okcidenta Lago

Strato en Hangôŭ






Budhostatuo en la templo Lingjin



Surakva tetrinkejo






Turistoj en la Okcidenta Lago



Famaj silkaĵoj de Hangĝoŭ



Eksterlandaj turistoj aĉetas silkaĵon de Hangĝoŭ.




*La ĉina stacio "Granda Muro"
konstruata en Antarkto*



Ĉinaj esploristoj rigardas fokon.

Ĉinaj esploristoj en la hejmloko de pingvenoj



Ĉina esplora bazo en Antarkto


de KE ŬEN

Fotoj de DŬAN ĜJIŬEN

Starigo de longtempa scienc-esplora stacio en Antarkto kaj sukcesa esplorado pri la Suda Oceano kaj Antarkto estis unu el la plej okulfrapaj sciencaj atingoj de Ĉinio en 1985.

La unua ĉina antarkta esplortaĉmento, konsistanta el du dekmil-tonelaj ŝipoj, ekveturis de la haveno Ŝanhajo, la 20-an de novembro, 1984. En 35 tagoj ili trapasis Pacifikon kaj ekvatoron kaj fine atingis la "misteran kontinenton" Antarkto. Tie ili starigis la unuan ĉinan antarktan scienc-esploran stacion — la stacion Granda Muro. La taĉmento faris plur-fakan sintezan esploron al la Antarkto kaj la Suda Oceano. Ili akiris dek-milojn da specimenoj, materialoj kaj donitaĵoj en mara areo de 100 mil kvadrataj kilometroj, kio akcelos la esploron de maraj biologio, hidrologio kaj geologio. Nun en la stacio laboras la unua ĉina travintra esplortaĉmento el 8 sciencistoj.

Antarkto estas fama pro siaj ekstrema frostoj, furioza vento kaj dika glacio kaj neĝo. Antarkto havas areon de 14 milionoj da kvadrataj kilometroj, pli ol 95% de ĝia tero estas kovrita de neĝo-glacio, meznombro du kilometrojn dika. Ĝenerale la sudan Pacifikon, sudan Atlantikon kaj la sudan Hindan Oceanon ĉirkaŭ ĝi oni nomas la Suda Oceano.



Diversaj bezonaĵoj en malŝarĝado



Gŭo Kun (la dua de dekstre), estro de la ĉina stacio "Granda Muro", donacas memoraĵon al la estro de sovetia esplora stacio, kiu ĉeestas la fondiĝan ceremonion de la nomita ĉina stacio.

La esploro de Antarkto komenciĝis malpli frue je pluraj jarcentoj ol tiu de Arkto. En 1895 du norvegoj venis al la antarkta kontinento. Aŭstralianoj starigis tie la unuan eternan scienc-esploran stacion en 1948. Nun tie troviĝas 40 tut-jaraj esplor-stacioj kaj pli ol cent someraj esplor-stacioj de 17 landoj, inkluzive tiun de Ĉinio. Ili faras sintezajn esploradojn pri meteorologio, glaciologio, geologio, geofiziko, biologio, medicino kaj naturaj riĉfontoj de Antarkto kaj akiris multajn gravajn atingojn.

La esplorado montras, ke sub la dika glacia kaj neĝa tavolo kuŝas riĉfontoj de fero, karbo, kupro, plumbio, zinko, mangano, oro, arĝento, uranio kaj aliaj, sume pli ol 200 specoj. Sub la kontinenta breto de Antarkto estas dekoj da miliardoj da tunoj da nafto kaj natura gaso. Ankaŭ ĝia marvivaĵa riĉfonto estas tre abunda. Tie vivas fiŝoj, balenoj, fokoj, sepioj kaj aliaj marvivaĵoj. Estas aparte menciinde, ke tie vivas bongustaj, nutroriĉaj antarktj eŭfaŭsioj (*Euphausia superba*), kies kvanto atingas miliardojn da tunoj.

Ĝuste pro siaj apartaj geografia situo kaj meteorologiaj kondiĉoj Antarkto fariĝis ideala natura scienca eksperimentejo. En la lastaj pli ol kvindek jaroj geologoj, marbiologoj, meteorologoj, arkeologoj kaj astronomoj venis al la neĝ-glacie

kovrita kontinento unuj post aliaj, sekvinte esploristojn. Ĉinio komencis en 1980 sian sciencan esploradon al la kontinento. En la lastaj jaroj 32 ĉinaj sciencistoj respektive kun tiuj de Aŭstralio, Nov-Zelando, Ĉilio, Japanio kaj Argentino faris esploradon al la kontinento kaj la Suda Oceano. Maje de 1981 Ĉinio starigis la Ŝtatan Komisionon pri Esplorado de Antarkto kaj havis kontakton kaj kunlaboron kun multaj koncernaj fremdlandaj institutoj. En majo de 1983 la ĉina registaro deklaris sian agnoskon de la Antarkta Traktato kaj fariĝis ĝia kontakta lando.

La unua antarkta esplora taĉmento de Ĉinio konsistis el fakuloj kaj teknikistoj pri marsciencoj, domkonstruado, elektroprovizado, komunikado, termezurado, mapado, meteorologio kaj diversa servado, sume pli ol 150 membroj. La dekmil-tonela scienc-esplora ŝipo "Ŝjangjanghong N-ro 10" kaj la urĝsava ŝipo "J 121" plenumis transportadon. La 25-an de decembro, 1984 la taĉmento atingis la insulon Kg. George de la insularo Sudaj Ŝetlandoj. Post plurtaga enketado ili decidis starigi sian stacion sur la insulo George.

La insulo estas la plej granda el la insularo Sudaj Ŝetlandoj. Ĝi estas ĉ. 80 km. de okcidente orienten kaj 28 km. de norde suden. La klimato de Antarkto estas la plej malbona sur la terĝlo-

Ĝŭo Kun (la dua de dekstre en la fronta vico), estro de la ĉina stacio "Granda Muro", kune kun argentinaj amikoj, kiuj helpas starigon de la stacio



Foto de ŜIN HŬA




bo. Tie regas frosto, furiozas ventego kaj neĝŝtormo. Tamen la insulo George havas kompare bonajn kondiĉojn en geografia situo kaj klimato. Ĝi estas ideala loko por starigi la stacion. Ĝuste pro tio, sur tiu ĉi malgranda insulo Sovetio, Ĉilio, Argentino, Brazilo, DR Germanio, Pollando kaj Urugvajo starigis sian tutjaran esplor-stacion kaj meteorologian centron.

La ĉina antarkta stacio Granda Muro situas sur iu duoninsulo okcidente de la insulo George (58°57'56" okc. longitudo, 62°12'59" suda latitudo). La stacio frontas al trafikfacila malgranda golfo, kiun nomis la Ĉina Esplora Taĉmento "Golfo Granda Muro" kaj la taĉmento konstruis tie kajon. La stacio sin apogas dorse sur montodeklivo tutjare neĝkovrita, kie abundas dolĉa akvo. Proksime de la stacio estas tri dolĉakvaj lagoj kaj kelkaj montetoj, kiuj ricevis la nomojn "Okcidenta Lago", "Altmonta Lago" kaj "Ŝterna Lago", "Testuda Monto", "Serpenta Monto", "Ebenpinta Monto", "Badaling" kaj "Ŝanhajgŭanmontpinto". La sezona rivero defluanta de la Altmonta Lago estis nomita "Ĝjuma-rivero". Antaŭ la stacio estis plaĝo 2 000 metrojn longa kaj 300 metrojn larĝa, kiu estas rezervejo de pingvenoj kaj balenoj. Tie troviĝas ankaŭ rezervejoj de birdoj, vegetaloj kaj fosilioj.


Hidrologia mezurado en la Suda Oceano



Meteorologia observado post neĝŝtormo



Sismologia provmezurado



Antarktaj vivaj estaĵoj filmataj de ĉinaj filmistoj


La taĉmento komencis konstrui la ĉefan konstruaĵon de la stacio Granda Muro la 20-an de januaro, 1985. Post pli-ol-unu-monata peniga laboro en uragano, la taĉmentanoj sukcese starigis la unuan ĉinan antarktan esploran bazon, meteorologian stacion kaj poŝtejon sur tiu ĉi senhoma loko. La meteorologia observejo estis agnoskita de la monda meteorologia organizo kaj akceptita kiel membro de la monda meteorologia observa reto. La poŝtejo jam elsendis leterojn kaj stampitajn unuataĝajn kovertojn.

La stacio konsistas ĉefe el du konstruaĵoj — loĝdomo kaj sciencesplora domo, ĉiu longas 20.6 m., larĝas 8.24 m. kaj altas 5 m. La domoj, ĉinstilaj kaj orangkoloraj, estas faritaj el malpezaj kaj munteblaj murplatoj kaj ŝtalaj framoj. Du romboformaj senda kaj akcepta antenaj retoj alte staras norde kaj sude de la stacio. Unu el ili havas altecon de 24 m., kaj perimetron de 100 m., kaj la alia altas je 18 m., kun perimetra longeco de 90 m. La meteorologia observejo estas ekipita per radioricevilo de satelita nubmapo, ringforma antena reto por meteorologia komunikado, meteorologia observa turo kaj ventmezura turo kun alteco de dek metroj. Krome sur la stacio dislokiĝas ankaŭ registrejo de la altatmosfera fiziko, Dopplerradara sistemo por determini la situon de satelito, sismoregistrejo kaj rezervejo de hejtaĵoj kun sferaj cisterno.

La 19-an de februaro okazis la ceremonio de la fondiĝo de la stacio Granda Muro. Posttagmeze de la 21-a de februaro la stacio eltenis pli-ol-11-gradan neĝstormon, kiu daŭris 48 horojn. La neĝstormo veninta de la landinterno de Antarkto atakis la stacion laŭ la buŝo de la golfo Granda Muro. Dum la ŝtorma atako la konstruaĵoj kaj ekipaĵoj estis sendifektaj, la aparatoj funkciis normale, la esplorado iris glate kaj la homoj vivis komforte.

Post la starigo de la stacio kaj sukcesa plenumo de la esplorado de la Suda Oceano, la Ĉina Antarkta Esplora Taĉmento revenis al Ĉinio la 10-an de aprilo, 1985. La aktivado de la ĉinaj sciencistoj por paca utiligo de Antarkto estas same okulfrapa kiel tiu de alilandaj sciencistoj.

Ĉinaj biologoj intrepraras kun usona sciencistino, kiu studas pri pingvenoj.



STELOJ EL LA LIMREGIONOJ

de ĜANG ĈINGĜEN

En tondra aplaŭdo oni pendigis orajn medalojn sur la brustojn de cent elstaraj gefiloj de Ĉinio, honoraj reprezentantoj de la konstruantoj kaj defendantoj de la limregionoj.

La aktivado de premio estis iniciatita de la redakcioj de "Ĉinaj Junuloj" kaj aliaj 13 ĵurnaloj kaj gazetoj. En malpli ol unu jaro, en 12 landlimaj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj 38 ministerioj kaj ministeria-nivelaj komisionoj de Ĉinio estis elektitaj 5 000 elstaraj reprezentantoj, el kiuj 100 gajnis orajn medalojn, 1 000 arĝentajn kaj 3 900 kuprajn. Inter ili estas intelektuloj, laboristoj, kamparanoj kaj landlimaj armeanoj el 40 naciecoj. La 100 gajnintoj de ora medalo ĉeestis la premian ceremonion okazintan en Pekino.

En Pekino tiuj 100 reprezentantoj kunvenis kun 45 verkistoj junaj, mezaĝaj kaj maljunaj, kunsidis kun studentoj por diskuti pri la vivo kaj homa idealo kaj amuzkunvenis kun artistaj trupoj, partoprenis en la riparado de la Granda Muro ĉe Badaling kaj raportis al la pekinaj gejunuloj pri ekspluatado kaj konstruado de la landlimaj regionoj. La raporto okazis en la halo de la Nacia Kultura Palaco.

"Geamikoj, kiam vi rigardis la brilantajn stelojn en la nokta ĉielo, ĉu vi rigardis la stelojn malrapide leviĝantajn el foraj landlimoj?" La televidstacia parolisto, kiu prezidis la programon, faris la demandon, kio cer-

bumigis la pli ol 1 000 ĉeestantojn de la ĉefurbo.

Ajguli, ujugura knabino de Ŝinĝjang, la unua faris raporton. Ŝi diris al la gejunuloj: "Mia laboro, banka kasisto en Kaŝi, enuigis min per la monotona bileto-kalkulado kaj iam vaporigis mian idealon. Poste, la tutlanda librolega aktivado por vigligi Ĉinion komprenigis min, ke la persona idealo devas esti konforma al la postuloj de la popolo." De tiam, ŝi diligente studis kaj serioze laboris. Ŝi fariĝis membro de la librolega raportistaro de la tutlandaj bankistoj por levi entuziasmon de la gejunuloj sindediĉantaj al la landlima konstruado.

Daj Hŭejping, honorita kiel "knabino-meteorologo sur la



Ĝang Hongŭej faras raporton al pekinaj gejunuloj.

monda firsto" suriris la podion. Post la diplomiĝo en 1981 en meteorologia lernejo, ŝi estis sendita labori en Ĉinghaj, alta je 4 600 metroj super la marnivelo. Ĉar la vetero sur la altebenaĵo koncernas la sekurecon de la aernavigo inter Pekino kaj Lhasa, tiu 24-jara meteorologo solvis multajn malfacilojn en la laboro por doni ĝustan veterinformon. En 3 jaroj

Ĝeng Gujfen kaj lia edzino Li Janŝja premiitaj





Premiitaj gejunuloj laboras sur la Granda Muro ĉe Badaling.

ŝi ne nur parkere memoris kaj bone distingis pli ol 100 speciojn da meteorologiaj kaj klimataj signoj kaj pli ol 400 telegrafajn kodojn, sed ankaŭ parkere memoris la meteorologi-observajn normojn kun pli ol cent miloj da han-lingvaj ideografiaĵoj. Pro ŝia diligenta kaj serioza laboro la procento de la eraroj de la meteorologia prognozo malmultiĝis ĝis 0.0%. Ŝi diris al la junaj geamikoj: "Ĉiufoje kiam mi elmezuris ĝustan donitaĵon aŭ sendis telegramon, mi sentis, ke kvazaŭ mi faris ion bonan por mia patrino. Ŝia rideto estas la plej bona rekompenco por mi."

Dong Gŭoĉeng, elstara diplomito de la Pekina Petrola Instituto, venis al Ĉajdam-baseno, kie ĉiam furiozas sabla vento, kaj enloĝiĝis en adoba kabano. Per la reformitaj aparatoj produktitaj de Ĉinio, li akiris valorajn donitaĵojn de la superprofunda puto, per kio li faris sian kontribuon al la petrola putomezurado de Ĉinio.

La 31-jara Ĝang Hongĉej, kamparano antaŭ 8 jaroj, nun estas direktoro de la Orienta

Konstrua Kompanio de la urbo Harbin. En 1978 li organizis kamparanan konstruan taĉmenton por servi al la urbaj institucioj kaj lernejoj. Per siaj bona kvalito kaj alta rapido ili multfoje rompis la rekordojn de la domeg-konstruado de la provinco Hejlongĝjang. En kelkaj jaroj, tiu kamparana taĉmento en Harbin akiris konfidon kaj kreis por si brilan perspektivon. En 1984 dank' al sia ĉiuflanka elstara laboro estis honorita kiel avangarda entrepreno de Harbin. Ĉifoje Ĝang Hongĉej estis premiita per ora medalo.

La kamparanoj de la nova generacio ne nur disvolvis sian talenton en la urboj, sed ankaŭ diligente laboris en la kamparo por ŝanĝi ĝian fizionomion. Unu el ili estas 28-jara Lŭo Jongfen. Diplomito de agronomia lernejo, li memvole venis al iu agronomia disvastiga stacio de Gujĝoŭ. La Mjaŭ-a vilaĝo de Bajŝje, kie li laboras, situas en malriĉa kaj izolita loko. Pro malofta kontakto kun la novaĵoj, la lokanoj ne volis fosi kanalojn nek kredi la sciencan terkulturadon. Lŭo Jongfen venkis ĉiujn malfacilojn

kaj post foj-refoja admonado al la vilaĝanoj li finfine gajnis ilian konfidon en la praktikado. En la vilaĝo oni ne nur fosis akvo-kondukan kanalon, sed ankaŭ disvastigis bonrasajn semojn kaj reformis 58% de la kampoj de la vilaĝo. Li ankaŭ instruis la mjaŭ-vilaĝanojn kulturi surbedo, raciigi la interspacojn de la plantaĵoj, plejble konservi humidecon de la grundo kaj science terkulturi, kaj dank' al tio tiujare ili akiris abundan rikolton. Post du jaroj, ŝanĝiĝis la malriĉa kaj postiĝinta fizionomio de la vilaĝo.

Inter la gajnintoj de la ora medalo estis estimata mezaĝulo Hŭang Ŝunjoŭ, longtempe vivinta en la "regno de animaloj", asistanta esploristo de la Zoologia Instituto de Kunming sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. Jam en sia juneco li memvole venis de Ŝanhajo en Junnan kaj tie laboras ĝis nun. Junnan kun 4 klimataj zonoj havas abundajn animalojn. En tiu "regno de animaloj" de komplika topografio kaj kapriĉa vetero, Hŭang Ŝunjoŭ trapasis en dekelkaj jaroj 52 000 kilometrojn en la sovaĝaj montaro, valo kaj ĉe la riverbordoj. Li faris multajn specimenojn de animaloj kaj verkis la eksplikaĵojn pri la ekologioj kaj vivkultimoj de la tieaj fiŝoj.

Sur la podio sidis geedza paro Ĝeng Gujfen, radara teknikisto ĉe la landlimo kaj lia edzino Li Janŝja. Ambaŭ ili devenis de Fangŝan-gubernio de Pekino. En 1973, post kiam ili geedziĝis en la hejmloko, Ĝeng Gujfen forveturis al sia landlima posteno. De tiam Li Janŝja sole zorgis la dommastrumadon. En la familio estas malsana bopatro kaj 3 junaj bofratoj. Ŝi, bonkora kaj diligenta, konstruigis 5-ĉambran domon tegole tegmentitan kaj kulturis

(Daŭrigo sur p. 23)

La novela verkado de Ĉinio en la lastaj dek jaroj



Noveloj aperintaj en la lastaj jaroj

Depost 1976 la moderna literaturo de Ĉinio eniris en novan prosperan periodon. Senprecedence disvolviĝis la novela verkado en tiu periodo. Ĉiujare publikiĝis proksimume dekmil no-

veloj, pli ol 700 mezlongaj noveloj kaj pli ol cent romanoj. Estis konate, ke dum la dek jaroj antaŭ 1976 daŭris serioza socia katastrofo en Ĉinio, nome la "kultura revolucio". Ĝi postla-

sis malfacile kuraceblan vundon sur la vivon, spiriton kaj psikon de la popolo. Oni soifis stabilan vivon kaj progreson de produktado. Mallongaj noveloj, profite de supereco de sia formo, rapide respondis al la psika bezono de la socio kaj unue disvolviĝis en la literatura rondo. En la komenco la novela verkado kun enhavo zorganta pri la gravaj sociaj problemoj vekis atenton de la legantoj kaj fortan eĥon de la socio. "Ĉefinstruisto" verkita de Liŭ Ŝin'u en 1977 priskribis la senklerecon de geknaboj psike vunditaj en la ĵus pasintaj ĥaosaj jaroj. Malpli-ol-16-jara Song Baŭĉi en la novelo malŝatis lernadon, sekve falis en abismon de senscienco kaj faris krimon. Pli atentinda estis alia knabino Ŝje Hujmin. Kvankam ŝi estis nature pura kaj bonkondata, tamen influata de la rigore fermita epoko ŝi estis senscia same kiel Song Baŭĉi kaj la spirita mondo estas pala kaj malriĉa. Ŝi eĉ rigardas

Liŭ Ŝin'u (la dua de maldekstre) en klasĉambro



novelon priskribantan norman amon kiel pornografiaĵon. Ŝi estis alispeca psike anormala figuro formita de la epoko. La novelo prezentis akran problemon kuraci psikajn vundojn de geknaboj kaj per tio vekis fortan respondon de la socio. "Dom-konstruado de Li Ŝunda" verkita de Gaŭ Ŝjaŭŝeng en 1979 rakontis mizeran kaj pensigan travivaĵon ordinaran en la ĉina kamparo. Kamparano Li Ŝunda decidis klopodi por konstrui triĉambran domon post la Agrara Reformo en la unuaj kvindekaj jaroj kaj faris por tio penadon, spertinte ĉiajn malfacilojn. Elspezinte tempon de 30 jaroj li fine konstruis por si ordinaran triĉambran domon. La novelo fidele esprimis la senton kaj penson de la kamparanoj retrorigardante la zigzagaĵojn en ilia vivo alportitajn de la historiaj eraroj. Kiam tiuperioda literaturo metis sian ĉefan atenton sur malkaŝadon de la malluma flanko de la socio "Pri Enoficiĝo de Fabrikestro Ĉjaŭ" verkita de Ĝjang Zilong en 1979 la unua priskribis vivece Ĉjaŭ Gŭangpu, entrepreniston strebantantan por modernigo de socialisma fabriko. Li havas rigoran sciencan spiriton kaj realisman sintenon. Li estas firma, rezoluta, senhezita en la laboro. Li ŝanĝis postiĝintan kaj ĥaosan generatoran fabrikon en bonordan entreprenon. La verko reprezentis la artan stilon de la verkisto.

Ekde 1979 mezlongaj noveloj aperis grandnombre kaj okupis okulfrapan lokon en la ĉina literaturo. "Anekdoto en Tjanjun-monto" verkita de Lu Jangŭo en 1979 kuraĝe tuŝis la erarojn en la politika movado en la kvindekaj jaroj kaj prezentis belan animon de la heroo kaj heroino. La heroo en la novelo Lŭo Ĉjun estis proklamita kiel popola malamiko en politika movado kaj

iris punlabori, lia amatino Song Ŭej forlasis lin. Kiam diversaj malfeliĉoj falis sur lin, Feng Ĉinglan, kiu delonge amis lin kaŝe, esprimis al li la amon kaj senhezite edziniĝis al li. Ili sinforĝese laboris en malriĉa vivo por disvolvi Tjanjun-monton. Ilia fideleco al la amo kaj afero en malfavoraj cirkonstancoj kurtuŝis sennombrajn legantojn. "En Mezaĝo" publikigita de verkistino Ĉen Ĵong en 1980 unufoje prezentis malriĉan vivon de mezaĝaj intelektuloj kaj skulptis idealan figuron de kuracistino. Farinte tri sinsekvajn operaciojn, ŝi subite svenis pro troa laciĝo de laboro kaj vivo kaj frontis al morto. Kvankam ŝi estis savita, tamen ŝi ne povis stariĝi denove, kiel rompita ŝtalaĵo. "Papilio" verkita de Ŭang Meng en 1980 rompis tempan kaj spacan kategoriojn, aplikis liberan asociadon kaj simbolan manieron. Ĝi priskribis, per psika priskribo kaj interna monologo, travivaĵon en dekoj da jaroj de Ĝang Sijŭan, kiu partoprenis en la revolucio en knaba aĝo, laboris kiel divesnivela gvidanto kaj spertis suferojn. La verkoj en tiu periodo priskribis ĉu pri la realaj problemoj ĉu pri la historiaj eventoj pli profunde ol tiuj de la antaŭa periodo.

En la okdekaj jaroj, kiam la ĉina ekonomia strukturo estas reformata, la novela verkado paŝis en etapon de vasta esplorado kaj strebado, prezentiĝis diversaj artaj stiloj, kaj ankaŭ la temoj fariĝis pli variaj.

En tiu etapo la verkoj, kiuj priskribas la ŝanĝiĝon de la vivo de la popoloj de diversaj socitavoloj alportitan de la ekonomia struktura reformo, okupas evidentan superecon en la kvanto. "Familioj en Ĝi-ŭo-ŭa" kaj "Jarfino kaj Jarkomenco" verki-

taj de Ĝja Ping'aŭ en 1984 vivece kaj delikate reaperigis novajn faktorojn en la ĉiutaga vivo de montregionaj ordinara kamparanoj de nordokcidenta Ĉinio en la granda socia ŝanĝiĝo. Verkistoj Ĝjaŭ Ĝjan kaj Ĝang Ŭej kun profunda melankolio rigardis la sturmon de novaj pensoj kaj konceptoj al la bona tradicia moralo, "Laŭjen-cang" aperinta en 1984 malkaŝis aliformitan ekspluatadon de kadroj al popolamasoj, "Klara Bazono" aperinta en 1984 priskribis kiel egoisma psiko detruis la sinceran amikecon inter laboruloj. Pli multaj verkistoj, kun Ĝjang Zilong kaj Ĝang Jigong kiel reprezentantoj, entuziasme prikantis la reformon kaj publikigis "Elegio de Hŭabej-Ebenaĵo", "Ĉunni kaj Ŝia Gas" en 1984 kaj similajn verkojn. Samtempe kun tio verkistoj ne ĉesis pripensi la pasintan vivon. "La Idoj de la Rivero" kaj "Verdaj Arboj" verkitaj de Ĝang Ŝjanljang en 1984 prikantis persisteman kaj helpeman karakterizaĵon de ĉinaj kamparanoj kaj spegulis maljustan traktadon al intelektuloj en la certa historia periodo. Iuj junaj verkistoj, kiuj venis iam de urbo al kamparo por partopreni en agrikultura produkta fiziklaboro, komencis kun sopiro priskribi sian vivon en la kamparo. "Mia Malproksima Ĉingping'ŭan" verkita de Ŝi Tjeŝeng en 1983, "Bordo en la Sudo" verkita de Kong Ĝjeŝeng en 1982 kaj "La Mistera Tero" verkita de Ljang Ŝjaŭŝeng en 1982 estas tiuspecaj verkoj.

En tiu etapo ankaŭ etikaj noveloj vaste vekis intereson ĉe verkistoj kaj legantoj. Frue en 1979 verkistino Ĝang Ĝje publikigis novelon "Amon Ne Forgesu", kiu rakontas senvelkan amon inter mezaĝaj gevoj havantaj respektive la familion, ilian rigo-



Lu Jangŭo (meze) en kamparo



Cen Jong

ran observadon al la tradicia moralo, ke ili ne povis geedziĝi ĝis la morto. La publikiĝo de la novelo estigis disputon kaj rezultigis, ke nemalmultaj verkistoj esprimis sian etikan kaj moralan koncepton en novela formo. Inter ili la influhavaj estas "Eraro, Eraro kaj Eraro" de Ĉen Jong (1984) kaj "Orienta Virino" de Hang Jing (1983).

Tiutempe prosperis ankaŭ folkloraj noveloj kun forta loka koloro. Deng Joŭmej sinsekve publikigis mezlongajn novelojn "Na U" (1982) kaj "Snuf-tabaka Flakono" (1984). Prenante la vivon de pekinaj urbanoj en la unuaj jaroj de la kuranta jarcento kiel temon, la aŭtoro esprimis sian amon al la tradiciaj kulturo kaj sento de la nacio pere de la viveca priskribado de la popolo kaj ĝiaj moroj. La vasta socia vivo kaj variaj manieroj de verkado faris tiuperiodajn novelojn buntaj kaj riĉaj.

Ekde 1984 la strebado kaj esplorado de verkistoj ekhavis novajn kurson kaj enhavon. Ili entuziasme zorgis gravajn sociajn problemojn kaj serioze lernis artajn manierojn de eksterlanda modernismo. Nun multnombraj mezaĝaj kaj junaj verkistoj kons-

ciis, ke ili devas elĉerpi riĉan nutraĵon el sia nacia tradicia kulturo; ke la literaturo devas radikiĝi en la grundo de la nacia tradicia kulturo. Tia strebado komence prezentiĝis en verko de veterana verkisto Ŭang Zengĉi. Liaj noveloj "Bonziĝo" (1980) kaj "Ĉe Marĉo Danaŭ" (1981) priskribis honestajn kaj sincerajn amikecon kaj amon inter la mal-superaĵ laboruloj. Ili havas klaran kaj belan lingvon kaj estas plenaj de poezia kaj estetika priskribo. En la du noveloj la aŭtoro jam komencis esplori psikan staton de la personoj laŭ iliaj moroj kaj kutimoj kaj kaptis konkretan manifestiĝon de la beleco de homeco en la kultura formo. Tio speguliĝis ankaŭ en la novelo "Nigra Ĉevalo" verkita de Ĝang Ĉengĝi en 1982. La tragedio inter la herooj Bajjinbaŭlige kaj Sŭomija okazis pro la konflikto inter la koncepto de moderna civilizacio kaj la antikva moro sur stepo. La eltenemo de la maljuna patrino kaj Sŭomija kontraŭ malriĉeco kaj mizero kaj ilia granda, profunda patrineco fidele enkorpiĝis la eminentan naciecon. Li faris pluapaŝan esploron pri naciaj spirito kaj psiko en siaj noveloj "Vespera Tajdo" kaj "Lunarko" (1985).

Juna verkisto A Ĉeng montris sian kompare profundan kulturen klerecon en sia debuta verko "Reĝo en Ŝakludo" (1984). La malriĉa Ŭang Jiŝeng en la novelo ŝatas ŝakludon kaj ricevis kromnomon Ŝakmaniulo. Li posedas bonan ŝakludan arton. En iu granda matĉo de ĉina ŝako, li gajnis grandan venkon en samtempa ludo kontraŭ naŭ rivaloj, inkluzive la ĉampionon, subĉampionon kaj la gajninton de la tria loko de la subprovinco. Per simpla priskribado la novelo tute nature bildigis la vivon kaj elmontris eĉ ŝakludo faktorojn de la nacia tradicia kulturo. "Gastronomo" (1983) de mezaĝa verkisto Lu Ŭenfu prezentis novan kampon de la nacia kulturo. La novelo priskribis ofte viditan fenomenon en la vivo: manĝado. La heroo Ĝu Zije havas neniun ŝaton en la vivo krom fajna manĝado. La aŭtoro faris bildecan priskribon pri la manĝa kulturo de Suĝoŭ kaj esprimis sian profundan ideon pri la socia problemo. Plejparto de la noveloj de juna verkisto Ĝeng Ji prenis la vivon en nordaj vilaĝoj kiel la temon. Liaj "Malproksima Vilaĝo" (1982), "Malnova Puto" (1985) priskribis mizerajn, sed

(Daŭrigo sur p. 14)



ĜANG ŬEJ:

KLARA BASENO

(Novelo)

La tagmeza suno rostis la blankan sablon sur la plaĝo, kaj tiu bakis la herbojn, la rampaĵojn de akvomelonoj kaj la homojn. Ĉio en la melonkampo estis malvigla: La folioj velke kliniĝis kaj la melonoj sur la tigoj profunde dormis en la kampo. La du maljunaj gardantoj de la melonkampo estis malsamaj en la karaktero: Frato la Sesa kuŝis sur mato por ripozi, dum Ŝju Baŭce patrole iradis en la kampo. Li, malalta, dika kaj sunbruna, portis nur nigran kalikotan pantalonon kun blanka talio, longan ĝis la suro, sen zono, li fiksis la pantalonon nodante ĝian blankan supron. Li rigardadis la melonojn ĉiam kun rideto kvazaŭ rigardante kapojn de dormantaj beboj.

De la sofora arbaro alblovis suda vento. Ŝju Baŭce levis la kapon kaj sentis grandan komforton. La arbaro estis sude de la melonkampo, profunda kaj malhelverda, jen de tie alblovis la vento kiu alportis malvarmeton. Ŝju Baŭce rigardadis al la arbaro kaj abomene diris "hm" tra la

nazo. Li ne tre bezonis la arbaron, ĉar li ne timis varmon. Kaj male, la arbaro estis bona kaŝejo por marodisto, kio multe ĝenis lin. La arboj balanciĝadis en la vento. Kiu povis certigi, ke en la arbaro ne kaŝiĝis marodisto?

Tamen la melonkulturistoj ne devis timi marodistojn. Ŝju Baŭce estis sperta je rimedoj kontraŭ marodistoj, sed Frato la Sesa neglektis ilin. La ĉirkaŭaj fiŝistoj sciis, ke Frato la Sesa estis malavara, kaj ofte ripozis en sia ŝedo. Kaj en tia tempo ankaŭ Ŝju Baŭce devis esti malavara kiel Frato la Sesa. Foje Ŝju pretiĝis por la fiŝistoj sitelon da trinkakvo, sed iu el la fiŝistoj verŝis la akvon sur la teron. Frato la Sesa ekridis, iris al la melonkampo kaj revenis kun du grandaj maturaj akvomelonoj sub la akseloj, kaj diris kun ridego: "La melonoj estas de la kolektivo, kaj vi povas manĝi, sed nur ne ŝtelu en nokto." Ĉiuj ridegis kaj ekmanĝis la melonojn.

La ŝedon frekventis knabo Lin Fa en la aĝo de 12-13 jaroj.

La knabo, sunbruna, alta, sed malgrasa, estis vigla kiel angilo. Ĉiufoje li, makulita de blanka kristaliĝo de salo, venis de norde, post bano en la maro, en kalsoneto, kun jaketo en la brakoj. Li sentis doloron paŝante sur la varma sablo kaj devis iri sur la piedpintoj, tial li iris lame kun mallaŭta krio "aj, aj. . ."

Veninte al la ŝedo, li sentis sin kvazaŭ hejme. Li kuŝiĝis sur la mato, metis la piedojn sur la glatan kaj malvarmetan dorson de Ŝju Baŭce, montrante sian komforton. Baŭce ofte ŝovis sian pipon en lian buŝon, kaj tiu ekfumis malferminte la okulojn kaj forte ektusis. Frato la Sesa tiam diris al Lin Fa: "Oj, kiel sentaŭga! Kiam mi estis en via aĝo, mi jam fumis tri jarojn." Tiam knabo Lin Fa retiris la piedojn kaj piedbatis Fraton la Sesan kaj diris defie: "Mi sentaŭga? Ĉu vi kuraĝas iri en la maron kune kun mi? Ĉu vi kuraĝas iri tien kien mi iros?" Mutiĝis Frato la Sesa: En akvo malgranda Lin Fa estas vigla kiel angilo.

Post nelonge Lin Fa diris, ke li volas manĝi melonon. Nur tiam Ŝju Baŭce kaj Frato la Sesa estis en la sama inklino: Ili ambaŭ senhezite iris en la melonkampon kaj revenis kunportante po grandan akvomelonon. Lin Fa rapide englutis unu el ili kaj malrapide ĝuis la duan. Kiam lia ventro elstariĝis, li paŝis el la ŝedo kaj iris al la kampomezo.

Tie estis klara baseno.

La baseno estis uzata por irigacii la melonojn. Malpeza vento bele sulkgis la akvosurfacon. Sub la klara akvo videblis herboj kaj blanka sablo. Lin Fa ofte naĝis en la baseno por forlavi la salan kristaliĝon de sur sia korpo. Ŝju Baŭce kaj Frato la Sesa kalkansidis apud la basenon kaj kun rideto rigardis lin distriĝanta en la akvo.

Lin Fa naĝis jen sur la flanko, jen sur la dorso, kaj la du brakoj svingiĝis kiel naĝiloj. Li vigle naĝis en la akvo kiel delfeno kaj levis ondetojn de kristalaj akveroj, kaj la akveroj ofte falis sur la du maljunulojn.

Kiam li elrampis el la baseno, lia ventro jam malpleniĝis, kaj li denove frandis melonon ĝis la lasta peco, restigante pecon kaj pecon da ŝelo. Frato la Sesa diris: "Vi ja estas melon-koboldo." Kaj Ŝju Baŭce kapjesis: "Jes, vere melon-koboldo."

Post longa tempo ili kvazaŭ forgesis lian veran nomon kaj nur vokis lin "melon-koboldo".

Melon-koboldo estis orfo vivtenata de sia onklo. Lin ne interesis lernado, kaj lian onklon ne interesis edukado por li. Ekde sia aĝo de 5-6 jaroj li jam ofte vagis sur la plaĝo. Li neniam manĝis melonon senrekompence. Li ofte akvumis kaj stucis la melonplantaĵojn. Li ofte ĝoje laboris duontagon sub la arda suno.

Baŭce domaĝis lin kaj foje-foje vokis lin ripozi en la ŝedo, sed Frato la Sesa ekfumis pipon da tabako, ridetante rigardis al la knabo kaj diris al Baŭce: "Lasu lin daŭrigi, li estas bona laborforto nutrata de ni per melonoj!" Kiam Melon-koboldo sentis lacon, li iris naĝi en la maro kaj revenis ĉiam kun du grandaj fiŝoj kaŝitaj post la dorso. La du maljunuloj do estigis fajron, faris el la fiŝoj supon, buletojn kaj ĝjaŭzi-ojn. Kelkiam Melon-koboldo alportis kelke da kraboj aŭ kelke da sepioj, polpoj, litorinoj, pektenoj. . .

La knabo venis ĉiun trian aŭ kvaran tagon kaj ĉiufoje la du maljunuloj volonte regalis lin per granda melono. Se en longa tempo li ne venis, la maljunuloj eksopiris lin.

Jen Melon-koboldo venis al la melonkampo, kiam la suno jam kliniĝis al la okcidento. Kontraŭkutime ĉi-foje li tranoktis en la ŝedo. Ŝju Baŭce ne edziĝis kaj kompreneble ne havis infanon. Tial li tre ŝatis karesi la varman ventron de Melon-koboldo, kiam ĉi tiu profunde dormis. Li sentis en tio grandan plezuron. Li pensis, ke ankaŭ li havus filon tiel grandan kiel Lin Fa, se li edziĝus en taŭga aĝo. Li kaj Frato la Sesa dormis alterne, ĉar unu el ili devis gardi la melonkampon. Kiam venis la vico de Frato la Sesa por gardi la kampon, li ofte vekis Melon-koboldon kaj kune kun li iris al la kamprando kaj tie bruligis fajron por kuiri ian manĝaĵon. La manĝaĵoj ĉiam estis pretigitaj de Melon-koboldo, ekz. apenaŭ kreskinta batato aŭ ternuksoj, kiuj estis tre bongustaj post kuro en sala akvo.

Foje Melon-koboldo apogis sin sur Ŝju Baŭce rigardante la lunarkon leviĝantan en la foraĵo. Subite li diris al Ŝju: "Onklo, mi

laboru venontjare kune kun vi. Mi ŝatas labori ĉi tie kaj ne estos dormema en nokto. . ."

Ŝju Baŭce prenis el kaldrono pecon da batato kaj metis en la buŝon kaj skuis la kapon.

"Kial?"

"Vi devas iri fiŝkapti sur la maro. Tio estas afero por vera viro. Vi venu ĉi tien, kiam vi maljuniĝos kiel ni."

Melon-koboldo eksilentis. De la maro aŭdiĝis svaga "ho ruk". Li aŭskultis tempeton kaj diris: "Mi iru peti kelkajn fiŝojn."

Li revenis vere kun kelkaj fiŝoj. Li komencis kuiri la fiŝojn kaj Ŝju Baŭce pretigis por si pipon da tabako, faris kelkajn enspirojn kaj diris al Melon-koboldo: "Rakontu ion al mi. . ."

Melon-koboldo diris: "Prefere vi rakontu. Vi estas maljuna, kaj preskaŭ ĉiu maljunulo havas multajn rakontojn."

Ŝju Baŭce tiris supren la vestan pantalonon kaj rakontis: "Foje mi semis kukurbon, tuj post la domo. Sed, divenu, kio elkreskis? Batatoj!"

Melon-koboldo eksplodis de ridego. Li rakontis per laŭta voĉo: "Foje mi semis maizon, sed, vi divenu, kio elkreskis? Ricino!"

"Kia mensogo!" Ŝju Baŭce haltigis lian bombaston frapforigante cindron en la pipo, "kian mensogon vi teksas?"

Melon-koboldo diris: "Ĉu vi ne mensogon teksas?"

"Mi ne," Ŝju Baŭce skuis la kapon, "knabo najbare al mi ŝtele enterigis batatojn. . . jen la afero."

Melon-koboldo senbrue ridis. Li rulis sin al melono kaj plukis ĝin. Manĝante la melonon, li komencis sian rakontadon: "Jen

vera okazaĵo. Mi ĵuras, ke estas vera, mi vidis propraokule. Iun jaron ŝveliĝis la rivero Luĉing. Oni diris, ke en la rivero estis multege da fiŝoj, kaj multaj instigis min kapti fiŝojn. Estis nebula tago. La riveron vualis pala nebulo. Ho, kiel peza nebulo! Miaj vestoj jam tute malsekiĝis dum mi iris de la hejmo ĝis la rivero. Tiun tagon malmultaj fiŝkaptis en la rivero, ĉar oni timis, ke monstro tiros ilin en la kavon profitante la pezan nebulon. Mi ne timis. Mi naĝis laŭ

la fluo kaj haltis en iu enranĉo de la bordo. . .

“Tie mi kaptis grandan fiŝon, sed ĝi faris sangan strekon sur mia suro per sia naĝilo. Mi kole-rigis kaj pugnobatis ĝian kapon, kaj ĝi kapitulacis. Mi surbordiĝis kun la fiŝo en la brakoj. . . Survoje mi sentis lacon kaj endormiĝis kun la fiŝo en la sino. Sed kiam mi vekigis, malaperis la fiŝo kaj restis sur mia brusto nur kelke da skvamoj. . .”

“Kien perdiĝis la fiŝo?”

Frotante al ŝi la okulojn, Melon-koboldo daŭrigis: “Ĝis nun mi ne scias kien. Tamen en la sekvanta tago, kiam mi venis al la foiro, mi vidis malgrandan knabinon vendanta fiŝon, kaj trovis ke la fiŝo estis tre simila al la mia.”

Ŝju Baŭce silentiĝis kaj ekfumis.

Ŝajne Melon-koboldo laciĝis kaj kuŝiĝis. Li prenis pecon da melono kaj eksuĉis anstataŭ manĝi, fiksante la rigardon al la stelplena ĉielo.

Lokustoj muzikis en foliaro de melonoj. Al ili respondis diversaj insektoj per diversaj zumadoj. Vaporo fuĝis el la kaldrono kaj en la aero satoriĝis la fiŝa bonodoro. Ŝju Baŭce deprenis la kaldronon de la fajro.

Iu malrapide alpaŝis. Pli proksime, estis klare, ke la alvenanto estas Frato la Sesa. Senparole li kalkansidiĝis apud la fajron kaj etendis la manojn al la fajro. Vidinte la melonajn ŝelojn, li piktuŝis per fingro la ventron de Melon-koboldo kaj diris: “Vere melon-koboldo!”

Ili trioje ekmanĝis la fiŝon. Estis tre abunda, kaj ankaŭ ordinara vespermanĝo. . .

(Daŭrigota)

Ilustraĵo de ŬEJ ZAJJUN



Lin Fa denove frandis melonon ĝis la lasta peco.

Kiel kreigiĝis segilo



Ilustraĵo de SA GENCSI

Legendo diras, ke segilo estas kreita de antikva ĉarpentisto Lu Ban.

Foje, Lu Ban bezonis multe da ligno por konstrui palacon. Li do sendis sian lernoknabon haki arbojn sur monto. Tiutempe ankoraŭ ne troviĝis segilo. Per hakilo oni hakis nur kelke da arboj en unu tago. Lu Ban maltrankviliĝis pro tio kaj persone iris al la monto por rigardi la aferon.

La monto estis kruta, tial Lu Ban devis grimpi supren paŝon post paŝo, kaptante arbojn kaj her-

bojn. Subite lia fingro estis vundita de herbeto kaj sangis. Kial tiel akra estas la herbeto? Atente rigardinte, Lu Ban trovis, ke la rando de la herbofolio havas dentetojn. Per fingro li tuŝis la dentetojn, kaj la fingro estis vundita. Li pensis, ĉu ne estos multe pli bone, se oni faros el fero ilon kun dentetoj imite al la herbofolio kaj segos arbon per ĝi. Tuj reveninte hejmen, li faris unu tian ilon kaj kunportis la ilon al la monto por ĝin provi. Ĝi vere estis pli akra kaj pli efika ol hakilo. De tiam oni komencis uzi segilon.

Ĝang Heng nombris stelojn



Nokte, la ĉielo estis plena de steloj similaj al sennombraj perloj inkrustitaj sur telero. En korto knabo sidis ĉe la avino, kun levita kapo, montris al la ĉielo kaj nombris stelojn en ĝi: unu, du, . . . cent . . . , ducent . . .

Kun rideto la avino diris: "Mia malsaĝa, vi denove nombras ste-

lojn. La steloj estas multemultaj, brilantaj kaj okulblindigaj. Ĉu vi povas klare ilin nombri?"

"Avino, se mi vidas ilin, mi do povas ilin nombri. Ili ja moviĝas, tamen ne senorde. Rigardu, inter ĉi tiu kaj tiu steloj ĉiam restas la sama distanco," diris la knabo.


"Mia nepo, vi rigardis atente. La steloj moviĝas en la ĉielo, tamen la distancoj inter ili estas sensanĝaj. Niaj prapatroj dividis ilin en grupojn kaj donis al ili nomojn," diris la avo. Montrante al la norda ĉielo, li daŭrigis: "Vidu, tiuj sep steloj interlige similas al ĉerpilo kaj nomiĝas la Granda Ĉerpilo (Granda Ursino). Ne malproksime de ili estas la Polusa Stelo, ĉirkaŭ kiu ĉiam rondiras la sep steloj."

Tion aŭdinte, la knabo malmulte dormis dum la tuta nokto kaj kelkfoje leviĝis por observi stelojn. Post sia observado li rimarkis, ke la sep steloj malrapide rondiras ĉirkaŭ la Polusa Stelo.

La knabo estis Ĝang Heng (78-139 p.K.). Li vivis en Han-dinastio. Kiel plenkreskulo li diligente studis pri astronomio kaj fariĝis fama astronomo. Li inventis la tertreman kaj ĉielkorpan aparatojn. Estis li, kiu la unua ĝuste klarigis la kaŭzon de luna eklipso. Laŭ lia opinio, tio okazas, pro tio ke la luno eniras en la ombron de la tero.

**NOVA PROGRESO DE
EKSTERA KOMERCO
DE ĈINIO**

En la unua duonjaro de 1985 Ĉinio akiris novan progreson en utiligo de fremdlanda kapitalo, kontraktado pri eksterlanda konstruado kaj eksporto de laborfortoj. Kreskis la importado kaj eksportado, kaj la totala sumo atingis 25.683 miliardojn da usonaj dolaroj, 29.26% pli multe ol tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. Interalie, la totala sumo de la importado atingis 14.422 miliardojn da usonaj dolaroj, 70.4% pli multe ol tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. Dekalkulite je la ŝanĝiĝo de prezoj, la importokvanto pliĝis je 72.5%. La totala sumo de la eksportado atingis 11.261 miliardojn da usonaj dolaroj, kun redukto de 1.3% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. Dekalkulite je la ŝanĝiĝo de prezoj, la eksportokvanto pliĝis je 4.9%. Ekde junio ĉi-jare iom boniĝis la situacio de la eksportado. Laŭ kalkulo la totala


*Rikolto de tritiko*

sumo de la eksportado de Ĉinio rimarkinde kreskos en la dua duonjaro de 1985. En la unua duonjaro Ĉinio akiris kompare grandan kreskon en komerco kun Japanio, Usono, Sovetunio, Hongkong k.a.

**BONA RIKOLTO DE SOMERE
MATURAJ PLANTAĴOJ DE
ĈINIO**

Jam finiĝis la unua somera rikolto post la kompleta reformo en

la produkta strukturo de la ĉina kamparo. Laŭ statistiko de koncernaj fakoj, la somera greno de Ĉinio donis bonan rikolton, kvankam reduktiĝis la semita areo. La totala produktokvanto de greno atingos 87.5 miliardojn da kilogramoj, nur iom malpli ol tiu de la pasinta jaro de riĉega rikolto. La totala produktokvanto de kolzosemoj atingos 53 500 000 kilogramojn, kun pliĝo de 31.6% kompare al tiu de la pasinta jaro.

La inaŭguro de la skulptaĵo Paco, donacita de Ĉinio al la japana urbo Nagasaki**LA SKULPTAĴO DE PACO
AL JAPANIO**

La inaŭguro de la Skulptaĵo de Paco donacita de Ĉinio al Nagasaki de Japanio okazis la 16-an de julio de la urbo.

La skulptaĵo estis farita de ĉinaj artistoj en pli ol unu jaro. La skulptaĵo prezentas junulinon karesantan kolombon, esprimante la deziron kaj amon de la ĉina popolo al paco kaj brila perspektivo.

**ESPLORSISTEMO POR
DOKTOROJ
PROVPRAKTIKATA**

Lastatempe Ĉinio decidis provpraktiki la esplorsistemon por doktoroj kaj asignis specialan



La ĉina Junulara Bazopilka Teamo revenis post gajno de la mondĉampioneo.

monsumon por starigi sciencajn esplorcentrojn por doktoroj.

La metodo kaj celo de la sistemo estas: Instalati nefiksajn postenojn en altaj lernejoj kaj esploraj institucioj kaj laborigi elektitajn doktorojn kun doktorotitolo tie dum certa tempo por larĝigi ilian amplekson de scioj, pluapaaŝe altiigi ilian kapablon de memstara laboro kaj fari ilin sciencistoj kaj instruistoj kun kompare alta nivelo.

La esplorcentro inkludas koncernajn kampojn de la baza kaj

aplika sciencoj. Post provado oni disvastigos la sperton. Laŭ la plano, oni akceptos 250 doktorojn en la jaroj kuranta kaj venonta. Ĝenerale, la doktoroj laboros kiel esploristoj en unu centro por du jaroj. Kiam ili finplenumos la laboron, ili devos forlasi la centron aŭ iri al alia centro. Ili laboros en malsamaj centroj ne pli ol kvar jarojn. La doktoroj-esploristoj, kiuj ne plu laboros en la centroj, povas konkurence gajni fiksan postenon laŭ la invitaj kondiĉoj de koncerna unuo. Oni povas ankaŭ

D-ro Taylor Wang (la tria de dekstre), liaj edzino kaj infanoj kaj lia kunlaboranto sur Tjan'anmen-placo de Pekino



doni al ili laboron laŭ ilia deziro kaj efektiva bezono de la buroo de sciencistoj sub la Ŝtata Scienca Komisiono de Ĉinio.

La ŝtato establos sciencan fonduson por doktoroj-esploristoj por premii kaj subteni la promesplenan junulojn el la doktoroj-esploristoj.

D-RO TAYLOR WANG EN ĈINIO

La unua ĉindevena usona sciencisto d-ro Taylor Wang, kiu vojaĝis en la kosmo kaj faris elstaran sciencan eksperimenton, faris du-semajnan vizitadon en Ĉinio kiel gasto de la Ministerio de Astronaŭtika Industrio. Li vizitis Pekinon, Ŝji-an, Gulin, Ŝanhajon kaj Hangĝoŭ kune kun siaj edzino, du filoj kaj asistanto.

SINGAPURA EKONOMIKISTO SERVOS KIEL KONSILANTO EN ĈINIO

Ekonomikisto d-ro Goh Keng Swee de la Respubliko de Singapuro akceptis la inviton de la ĉina registaro kaj servos kiel ekonomika konsilanto por disvolvi apudmarajn regionojn de Ĉinio. La 67-jara ekonomikisto funkciis kiel ministro de defendo, ministro de financo kaj la unua vicĉefministro de Singapuro. Li posedas multe da scioj kaj havas sufiĉe da sperto.

LA ĈINA JUNULINA BAZOPILKA TEAMO GAJNIS MONDAN ĈAMPIONECON

La Ĉina Junulina Bazopilka Teamo gajnis la ĉampionecon en la Dua Monda Junula Bazopilka Ĉampionea Konkurso, okazigita de la Internacia Bazopilka Federacio en Fargo de Norddakoto, Usono, en julio. La japana teamo gajnis la subĉampionecon. Estis la unua fojo, ke Ĉinio gajnis tian mondan ĉampionecon.



La Filadelfia Junula Simfonia Orkestro en Pekino

LA FILADELFIA JUNULA SIMFONIA ORKESTRO EN ĈINIO

De la 20-a de julio ĝis la 8-a de aŭgusto la Filadelfia Junula Simfonia Orkestro turneis en Pekino, Ŝanhajo, Hangĝoŭ, Tjanĝin, Hongkong, kaj prezentis 7 spektaklojn.

La orkestro ludis la uverturon "Egmont" de Betoveno, la baletan muzikon de "La Dormanta Belulino" de Chaikovsky, "Violona Konĉerto en G Minora" de Bruch kaj la ĉinan muzikon "Erĉjŭanfonto en Lunlumo". La prezentaĵo estis bonvenigata de ĉinaj aŭskultantoj.

"STELOJ DE BALETO DE LA MONDO" EN PEKINO

En la mezo de julio la trupo "Steloj de Baletto de la Mondo" el baletistoj de Usono, Kanado, Francio kaj Japanio trifoje prezentis en Pekino.

La trupo prezentis fragmentojn de la baletoj "La Korsaro", "Giselle", "La Cindrulino" kaj "Apolono". La lerta prezentaĵo riĉa je modernaj dancmovoj rompita la tradician rutinon, impresis freŝe kaj estis bonvena al la ĉinaj rigardantoj.

ĈINIO — NOVA MEMBRO DE LA INTERNACIA SPECIALA OLIMPIKA GRUPO

La 4-an de julio s-ino Eunice Kennedy Schriver, prezidanto de la Internacia Speciala Olimpika Grupo, okazigis ceremonion en Dublino de Irlando por akcepti Ĉinion kiel ĝian novan membron.

La grupo fondiĝis en 1968. Ĝiaj fondintoj estis E. Kennedy Schriver, pli aĝa fratino de la usona eksprezidanto Kennedy, kaj ŝia edzo. La grupo celas disvolvi sportadon inter mensaj debiluloj de ĉiuj landoj. Nun ĝi havas pli

ol 50 membro-landojn kaj organizis ses somerajn olimpikojn kaj unu vintran olimpikon.

Ĉinio estas preparanta starigon de sporta grupo de mensaj debiluloj.

GAJNINTO EN LA SIDNEJA INTERNACIA PIANA KONKURSO

La 18-jara ĉina pianisto Du Ning'u gajnis la unuan lokon en la Sidneja Internacia Piana Konkursito okazinta en Sidnejo en julio. La konkursito havis kvar rondojn da ludo.

La trupo "Steloj de Baletto de la Mondo" post prezentaĵo en Pekino





MOROJ DE ĈINOJ EN MANĜADO

de MEJ ĜI

Ilustraĵo de ŜA GENĜSI

La ĉefaj manĝaĵoj de la ĉinoj ĝenerale estas faruno kaj rizo prilaboritaj per apartaj metodoj. En la pasinteco multaj manĝaĵoj de Ĉinio portis specifan sencon. Oni kutimas preni malsamajn manĝaĵojn en malsamaj kazoj.

Ekz., unu el la ĉefaj manĝaĵoj de la nordanoj estas vermiĉeloj prilaboritaj el tritika faruno en fadenformajn pastaĵojn. Post kuirado oni aldonas al ili diversajn spicaĵojn. La vermiĉeloj estas malsamaj, kiaj tiuj kun porkaĵo, orelfungo kaj ovaĵo miksitaj kun amela saŭco, tiuj kun fritita sojfabo misoo, tiuj kun sezama misoo, tiuj kun porkaĵo aŭ bovaĵo, kaj tiuj kun nur spicaĵo kaj graso. Per malsamaj prilaboroj oni ricevas malsamajn vermiĉelojn, kiaj maŝinfaritaj, tranĉitaj, tiritaj k. a. Pro sia facila farado kaj manĝado, ili estas unu el la ĉefaj manĝaĵoj de ĉinoj.


La ĉinoj ŝatas vermiĉelojn ne nur pro ilia moleco kaj facila digestiteco, sed ankaŭ pro ilia specifa senco en malsamaj kazoj. Laŭ la tradicia moro, la ĉinoj

senescepte manĝas vermiĉelojn en la naskiĝtago, kiel la okcidentanoj manĝas torton en tia tago. Vermičeloj estas maldikaj kaj longaj, kio simbolas longvivecon. Tial vermiĉeloj por celebri la naskiĝtagon estas admirindaj pro sia longeco. Tio postulas kaj lertan faradon kaj moderan kuiradon, alie vermiĉeloj rompiĝas, kion oni rigardas malbonaŭgura.

Estas alia faruna manĝaĵo ĝjaŭzi-o. Por prepari ilin oni unue rulpremas la tranĉitajn pastetojn en platajn rondajn pecojn, metas sur ĉiu peco farĉon, faldas la pecon kun farĉo ene kaj firme kunpremas la randon. Ĝenerale, oni kuiras ĝjaŭzi-ojn en bolanta akvo, vaporumas aŭ fritas ilin en kuirpoto. La farĉo ĝenerale estas preparita el haketitaj kaj spicigitaj viando kaj legomo, kaj eĉ marproduktaĵo kaj ovaĵo, aŭ nur el haketita kaj spicita legomo. Bonkvalitaj ĝjaŭzi-oj devas esti malgrandaj, kun multe da farĉo, maldika peco kaj mallarĝa rando. Iufoje oni borderas

la randon per figuroj de papilio, orfiŝo k.a.

Laŭ la tradicia moro de la nordanoj, ĝjaŭzi-oj servas kiel la plej grava manĝaĵo en festaj tagoj. Precipe en la Printempa Festo, oni senescepte devas manĝi ĝjaŭzi-ojn. Por tio ĉiuj familianoj kune sidas ĉe la tablo, iuj rulpremas la tranĉitajn pastetojn, aliaj faldas la pecojn kun farĉo kaj firme kunpremas la randon, triaj kuiras ilin. En la tuta familio regas ĝojo kaj plena harmonio. Sed la maljunuloj ne kontentas pri tio, sed turnas pli da atento al iliaj formo kaj farĉo. Ĝjaŭzi-oj por la Printempa Festo ĝenerale portas ŝu-formon, kiu similas arĝentan ingoton kaj simbolas riĉiĝon. Oni iam enmetas moneron en ĝjaŭzi-on. Kiu manĝas tiun ĝjaŭzi-on, estos feliĉa en la tuj venonta jaro.



BUKEDO AL VI



MIKRONOVELOJ pri ĉiutaga vivo de ordinaraj ĉinoj, pri interrilato de najbaroj, familia vivo, amikeco, amo k.a.

Eldonita de ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

Formato: 110×180mm. 96pĝ.

Prezo: £0,65 US\$1,30

Numero: 10-Es-1881P



MAPO DE LA ĈINA POPOLA RESPUBLIKO

(Esperanta eldono)

kolore presita, kun indekso, necesa por legado de EPC kaj aliaj Esperantaj libroj de Ĉinio

Esperantigita de ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO Eldonita de KARTOGRAFIA ELDONEJO, PEKINO

Formato: 770×540mm. Prezo: £0,50 US\$0,95 Numero: 12-Es-1598P

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA**

Perantoj de EPC aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Tra Ĉinio estas videblaj similaj fenomenoj. Ekz., en iuj lokoj ĉinoj manĝas en la Printempa Festo vaporumitan gluec-rizan farunaĵon kun la koloroj flava kaj blanka, simbolantaj oron kaj arĝenton. La gluec-riza farunaĵo ĉinlingve estas *njangaŭ*. *Njan* signifas jaron kaj *gaŭ* altiĝon. Ili kune signifas, ke la vivo altiĝas

jaron post jaro. Antaŭ la Printempa Festo, t. e., la oka de la dekdua monato de la jaro laŭ la luna kalendaro, la nordanoj manĝas ok-trezoran kaĉon el grajnoj de rizo, milio, glueca rizo kaj sorgo, ruĝaj faboj, jujuboj, juglandoj kaj ternuksoj. Ili, kune kuiritaj, simbolas riĉan rikolton en la venonta jaro.

Eĉ la manĝ-manieroj por iuj manĝaĵoj enhavas ian aludon. Ekz., en la Printempa Festo oni ne devas manĝi la kapon kaj voston de fiŝo kun la espero vivi bonan vivon de la komenco ĝis la fino de la venonta jaro.

Komprenoble, tiuj moroj pli kaj pli maloftiĝas inter la gejunuloj.

PROTEKTO DE “VIVPANA KORBO” DE LA HOMARO

Nun en la mondo vivas 4.8 miliardoj da loĝantoj, kiuj eble superos 6 miliardojn en la fino de ĉi-jarcento. Tamen sur la terĝlobo rapide reduktiĝas la agraroj, arbaroj, akvoproduktaĵoj kaj sovaĝaj bestoj kaj vegetaĵoj. Laŭ la nuna rapideco antaŭ la fino de la kuranta jarcento perdiĝos triono de la agraroj kaj pli ol duono de la produktivaj tropikaj arbaroj kaj en la sekvontaj 20 jaroj malaperos 500 000 — 1 000 000 specoj de vivaĵoj. Laŭ la detruigo de la terĝloba biosfero la koncernaj departementoj de UN alvokis — “Savu la mondon” kaj asertis, ke la biosfero estas la “Vivpana korbo” de la homaro kaj protekto de la riĉfontoj de kreskaĵoj estas la plej grava afero por ĉiu homo.

Ĉu tio estas troiga? Ne, tute ne!

Prenu agraron kiel ekzemplon. La kontinentoj konsistigis nur 30% de la totala areo de la terĝlobo t. e. ĉ. 149 500 000 kvadrataj kilometroj, kies dekono estas kulturebla. Tamen tiel multaj agraroj estas senĉese englutataj de la urba, trafika, fabrika kaj milita konstruado kaj de ekspluatado de subteraj riĉfontoj. En Usono ĉiujare perdiĝas pli ol 12 000 kvadrataj kilometroj da agroj pro disvastigo de urba kaj trafika konstruado, pli ol 48 000 kvadrataj kilometroj da tero pro mineksplutado, dum la milita konstruado entute oku-

pis pli ol milionon da kvadrataj kilometroj da tero. En Kanado ĉiujare perdiĝas pli ol 1 300 kvadrataj kilometroj da agroj pro disvolviĝo de la urboj. En la sesdekaj jaroj Norvegio, Nederlando kaj Japanio perdis 1.5%, 4.5% kaj 7% de la agroj respektive. En Sovetunio kaj la Orienteŭropaj landoj la agroj estas ankaŭ serioze perditaj. En Ĉinio la pokapa meznombra posedo de agro estas 1.5 mu-oj (1 muo = 1/15 hektaro) da agro. En la pasintaj pli ol 20 jaroj ĉiujare perdiĝis pli ol 20 milionoj da mu-oj da tero pro fundamenta konstruado. Laŭ tiu rapideco la pokapa meznombra agroposedo en Ĉinio estos malpli ol unu mu-o en la jaro 2000.

La detruado de arbaro kaj vegetaĵaro kaŭzas degeneradon de agroj kaj erozion. En Usono 12 000 kvadrataj kilometroj da agroj degeneris ĉiujare pro erozio. Hindio ĉiujare perdis 6 miliardojn da tunoj da fekunda grundo kun pli ol 6 milionoj da sterkaĵo, kiuj eĉ superas la kvanton sterkitan, kaj plie duono de ĝia agraro estas minacata de la granda erozio. En Ĉinio la erozia tero atingis 1.5 milionojn da kvadrataj kilometroj, 300 000 kvadrataj kilometroj da tero estis minacataj de ventego kaj la perdita sterkaĵo egalas al tiu de Hindio.

Ankaŭ grandiĝo de dezertoj estas unu el la gravaj kaŭzoj de

agrara perdiĝo. En la mondo 63 landoj suferas atakon de dezerto, la totala areo de dezerto jam atingis 20 milionojn da kvadrataj kilometroj. Nun ĝi ĉiujare englutas 5 800 kvadratajn kilometrojn da tero. Laŭ tiu rapideco, antaŭ la fino de tiu ĉi jarcento 14% de la monda loĝantaro vivos en sekegecaj kaj duonsekecaj regionoj kaj du trionoj de la loĝantaro troviĝos sub la minaco de dezerto.

La konsistigaj partoj de la ekologia sistemo estas influataj unu la alian. Perdiĝo de la tero kaj detruo de la arbaro povas kaŭzi pereon de iuj vegetaloj kaj bestoj kaj malmultiĝon de akvoproduktaĵoj. La agado de la homoj en iu regiono ofte influas aliajn regionojn kaj eĉ la tutan terĝlobon. Ankaŭ la ekologio, socio kaj ekonomio estas interligataj. Tion oni ne konas aŭ konas tre malmulte. Se oni ne prenas efikajn rimedojn, la vivtena kapablo de la homaro pluaparte malleviĝos kaj la homaro donos al siaj posteuloj nur kompatindan heredaĵon.

Kompreneble, ni ne estas depirimitaj. Ĝuste diris iu sciencisto: La biosfero estas por ni regener-pova torto, protekti la biosferon estas efika rimedo por ke ni ĉiam havu la torton. Se la homaro volas komforte vivi sur la tero kaj ne difekti ĝian provizan kapablon, oni do devas protekti la biosferon — “vivpanan korbon” de la homaro.

Kuraĝigoj de niaj legantoj

Jen estas citaĵoj el leteroj de niaj legantoj pri la traduko kaj publikigo de artikoloj el nia gazeto. Traduko kaj represo de artikoloj kaj fotoj el nia gazeto kaj dono de proponoj kaj opinioj pri ili estas ĉiam bonvenaj al ni.

La Red.

Vi certe miras, kiam vi ricevas libreton sur kies kovrilo estas ĉinaj ideogramoj, kaj kies bildoj venas el via revuo. Volonte mi klarigos la aferon, sed unue ni devas pardonpeti, ke ni ne pli frue sciigis vin, kaj ke ni ne jam antaŭe petis vian permeson!

La 30-a de aprilo en nia lando estas nacia festo. Laŭ moderna tradicio oni en multaj urboj rajtas en tiu tago senpermeso vendi varojn surstrate, kaj klopodi varbi membrojn por kluboj kaj unuiĝoj. Tiel ankaŭ en nia urbo. La membroj de la Esperanto-klubo decidis ke ni informu en tiu tago la publikon pri la valoro de Esperanto kiel ponto inter kulturoj kaj popoloj. Ni faris belan budon, kaj ni havis la ideon prezenti al la homoj la kuracmetodojn per masaĝo, kiuj aperis en via revuo, precipe ĉar en nia lando estas kreskanta inte-

resiĝo pri viaj lando kaj popolo, kaj pri nekutimaj kuracmetodoj. Unu el miaj lernantoj desegnis la ideogramojn, mi esperas ke ili estos korektaj. Li venas el Hongkong. En la enkonduko ni prezentas vian revuon, kaj rakontas pri la celo de Esperanto. En la fino estas instigo al lernado. Al la vizitantoj de la budo ni rakontis pri la evoluo de Esperanto, precipe en via lando.

J. K. Hammer (Nederlando)

La unuan numeron kun tiuj novaj literoj sur titolpaĝo oni montris en tre konata kaj vaste-distribuata televidprogram-gazeto "Gong". La ĉefredaktoro skribis bonegan artikolon pri lingvo internacia kaj donis al sia artikolo ankaŭ adreson de la Esperanta Klubo München. Centoj da informpetoj pri Esperanto venis nur al nia klubo. Kiom da in-




La hungara revuo "Mondo kaj Lingvo", en kiu oni publikigis nian artikolon pri la amaferoj de ĉinaj gejunuloj

formpetoj ricevis la Germana Esperanto-Junularo (Deutsche Esperanto-Jugend) ni ankoraŭ ne scias.

J. Pachter (F. R. Germanio)

Kiel mi promesis al vi antaŭ du monatoj, nun mi sendas al vi nian revuon "Mondo kaj Lingvo", en kiu ni publikigis vian artikolon pri la amaferoj de ĉinaj gejunuloj. Tiamaniere ni intencas kontribui al internacia kultura interŝanĝo.



Libreto pri masaĝo, kies tekstoj estis elesperantigitaj de nia nederlanda leganto el nia revuo "El Popola Ĉinio"

PROSPERAS LA TIBETA LOĜANTARO

de SUN MINGĜEN

En Tibeto urboj dilatiĝas senĉese, kamparaj domoj pliiĝas rapide, loĝantaraj registrolibroj de loĝanteco-administraj organizoj dikiĝas tagon post tago. La nombro de la geknaboj superas tiun de iliaj gepatroj kaj en la urboj kaj en la kamparoj. La loĝantaro de Tibeto kontinue kreskas je 2% ĉiujare.

Oni ofte demandas, ĉu la naturaj medioj de la frosta Tibeta Altebenaĵo, kie mankas oksigeno, ne malhelpas la homan generadon?

La verko "Praktika Medicino de la Altebenaĵo", kompilita de spertaj tibetaj kuracistoj kaj eldonita en la fino de 1984, diras, ke la tibetaj geviroj loĝantaj sur la altebenaĵo havas saman generopovon kiel la hanoj loĝantaj ĉe marbordoj kaj sur ebenaĵoj. Tion konfirmis ankaŭ la enketoj de higienistoj.

Tamen en la longa periodo antaŭ la 50-aj jaroj de la 20-a jc. la tiamaj soci-sistemo, materiaj viv-kondiĉoj kaj medicina nivelo malrapidigis la kreskon de la loĝantaro. Tiu fenomeno eviden-

te ŝanĝiĝis nur post la paca liberigo de Tibeto en 1951, precipe post la demokratia reformo en 1959. Ekde la mezo de la 60-aj jaroj ĝia loĝantaro kreskis pli rapide kaj de tiam Tibeto eniris en la prosperan periodo de loĝantara kresko.

En la historiaj verkoj pri Tibeto legeblas stranga fenomeno: En la komenco de la 7-a jc., kiam la Tubo-a reĝimo ekspansiigis sian teritorion al la grandeco preskaŭ egala al la hodiaŭa Tibeto, tie loĝis ĉ. 0.9-1 miliono da loĝantoj. Poste kiam la Tubo-a reĝimo etendis sian regadon al partoj de la nunaj Ĉinghaj, Gansu, Siĉŭan, Junnan kaj vasta regiono sude de la montaro Himalajo, la tieaj loĝantoj superis 10 milionojn. Forpasis de tiam 1 300 jaroj, kiam la homa socio eniris en la lastajn jarojn de la 4-a jardeko de la 20-a jc, sur tiu tero loĝis nur 957 000 loĝantoj, alivorte, en tiuj 1 300 jaroj la totala nombro de la tibetaj loĝantoj ne kreskis. La historiaj literaturoj notis, ke inter la fino de la 17-a jc. kaj komenco de la 18-a jc., t.e. en la komenca

periodo de Ĉing-dinastio, tie la loĝantoj nombris 1.3—2 milionojn, sed en la sekvaj pli ol 200 jaroj, kiam la loĝantaroj en la tuta mondo kaj aliaj partoj de Ĉinio rapide kreskis, en Tibeto aperis malkreska tendenco de loĝantaro.

"Tibeta Esploro", organo de la Tibeta Akademio de Sociaj Sciencoj, en siaj du traktaĵoj antaŭ nelonge publikigitaj konigis, kial la nombro de tibetanoj stagnis kaj eĉ reduktiĝis kelktempe en la pasinteco. La frosta kaj trosekeca naturaj kondiĉoj, longdaŭra servutula sistemo kaj subevoluintaj produktaj teknikoj katenis la disvolviĝon de terkulturo kaj brutobredado, pro kio la porvivaj bezonaĵoj kreskis malrapide. En 1951 ĉiu tibetano posedis meznombre nur 115 kg da greno kaj 8 brutojn (el kiuj unu povas esti buĉata), kio katenis kreskon de la loĝantaro. Sub la servutula sistemo la distribuo de la riĉaĵoj estis ege malegala. La servutuloj kaj sklavo, kiuj konsistigis plejparton de la loĝantaro, vivis mizere. Ili ne povis vivteni siajn gefilojn. Ili ne havis personan


Mi informas vin, ke ni republikigis kelkajn artikolojn de via organo en hungara lingvo, ĉar niaj legantoj tre interesiĝas pri la kultura kaj ekonomia vivo de la nuntempa Ĉinio.

Antaŭ longe vi publikigis artikolon en "El Popola Ĉinio" pri

la sukceso de la ĉina petrolkemia industrio. Pri tio multaj hungaraj fakuloj interesiĝis, kaj ne nur esperantistoj. La kialo estas, ke antaŭ 30 jaroj multaj hungaraj fakuloj laboris en Ĉinio je la komenco de la evoluo de la nuntempa ĉina petrolkemia industrio.

Kaj por tiaj fakuloj estas speciale interese vidi la rezultojn post 30 jaroj. Sekve de tio ni ŝatus publikigi artikolojn ankaŭ pri tiu temo kaj en esp-a movadorgano kaj en neesp-aj fakjurnaloj.

Markus Gabor (Hungario)



Sur strato de Lhasa Foto de ŜJŬE ĈAŬ

liberecon. Parto de ili eĉ ne havis rajton oficiale edziĝi kaj fondi memstaran familion. Tie ekzistis poligamio kaj poliandrio, ankaŭ kio serioze malhelpis la kreskadon de loĝantaro. La tibetanoj ĝenerale kredis lamaismen. Ĝia plej granda sekto Gelu malpermesis bonzojn edziĝi kaj generi. Iam la bonzoj kaj bonzinoj konsistigis 25% de la tuta loĝantaro kaj pli ol 1/3 de la naskipovaj geviroj, ankaŭ kio stagnigis kaj eĉ reduktis la kreskon de la loĝantaro. Tiam en Tibeto la medicina-higiena afero estis tre postĝinta kaj ne povis garantii la saĝon de la loĝantoj. Ĉiufoje kiam furiozis epidemio, loĝantoj mortis grandnombre. En 1936 kaj 1947 morbito dufoje trafis la Orientan Tibeton kaj forrabis la vivon de 1/3 de la loĝantaro en iuj gubernioj. La ekstreme malbona nutrado kaj furiozado de diversaj malsanoj mallevis la naskipovon de virinoj kaj levis la mortokvanton de la beboj. Enketo en 1982 montris, ke la virinoj pli-ol-70-jaraj, kiuj ĉesis

naski antaŭ 1959, naskis meznombre nur 2.8 infanojn, de kiuj nur malpli ol duono postvivis. Tial estis ne strange, ke en iu historia periodo la loĝantoj en Tibeto ne nur ne kreskis generacion post generacio, sed male, malpliigis generacion post generacio.

Post la paca liberigo de Tibeto, la centra registaro de Ĉinio praktikis la politikon "kuraĝigi naskon por pliigi la loĝantaron" en Tibeto, laŭ la konkretaj kondiĉoj de Tibeto, kie la tero estas vasta kaj loĝantoj malmultaj. Hodiaŭ, kiam en la landinternaj partoj de Ĉinio oni praktikas naskolimigon kaj kuraĝigas tion, ke ĉiu geedza paro havu nur unu infanon, oni ankoraŭ ne limigas la naskon de la tibetanoj kaj aliaj nacimalplimulto. En la landinterno malofte videblas, ke geedza paro malpli-ol-35-jara havas du infanojn, dum en Tibeto multaj samaĝaj geedzoj havas tri infanojn.

La demokratia reformo en 1959 portis personan liberecon al la servutuloj kaj sklavoj kaj iom post iom ŝanĝis la geedziĝan sistemon. Ekde tiam en Tibeto oni praktikas monogamion, la geedziĝo kaj familioj estas protektataj de la leĝo, ĉio ĉi kreis normalajn kondiĉojn por la generado de la loĝantoj. Enketo montris, ke tie antaŭ la demokratia reformo 26-27.5-jaraj virinoj ekhavis la unuan infanon sed nun 22-jaraj

Korpo-ekzamenado por infanoj Foto de MA ĜINGĈIU




virinoj ĝenerale havas sian unuan infanon. Antaŭe en ĉiu jarcento la loĝantaro generis je 3 generacioj, sed nun je 4.5 generacioj. La ŝanĝiĝo de la socia sistemo akcelis la produktadon kaj plibonigis la popolan vivon. En 1965 ĉiu loĝanto posedis meznombre 208 kg. da greno kaj 22.4 brutojn, kiuj poste pliiĝis jaron post jaro. La leviĝo de viv-nivelo pliiĝis naskipovon. Enketo montris, ke post la demokratia reformo la tibetaj virinoj eniris en kulminan periodon de nasko. La nunaj 50-jaraj virinoj ĝenerale naskis 5.13 fojojn, t. e. proksimume duoble ol iliaj patrinoj.

Pro la supre menciitaj kaŭzoj rapide pliiĝis la loĝantoj en Tibeto. La ĝenerala loĝantara censo de Ĉinio en 1982 montris, ke Tibeto jam havas 1 892 393 loĝantojn, tiu nombro estis proksimume 2-oble kompare kun tiu antaŭ 1951, kaj je 60% pli multa ol tiu en 1959. Ekde 1965 ĝis 1982 la natura kresko de la loĝantaro pliiĝis je 2.07% jare. En la fino de 1983 Tibeto havis pli ol 1 930 000 loĝantojn, el kiuj 95.1% estas tibetanoj.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj la loĝantaro en Tibeto rapide kreskis kaj ĝia kvalito boniĝis evidente. Dokumentaj filmoj produktitaj en la komenco de la 50-aj jaroj montris, ke tiam la tibetanoj plejparte estis ĉifone vestitaj, marasmaj kaj malvigilaj. Sed nun, ĉu en la urboj ĉu en la kamparo, la loĝantoj plejparte estas sanaj kaj fortaj kaj sin vestas pure kaj bonorde. En 1982 la tibeta higiena organizo faris ĝeneralan enketon al 6 600 mez-kaj element-lernejanoj kun aĝo de 7-17 jaroj. La enketo per grandnombraj donitaĵoj montris, ke la san-stato de la tibetaj geknaboj multe pliboniĝis ol tiu de la geknaboj en 1965, kiam oni

Juna paŝtisto

Foto de **ŜIN HŪA**



faris la unuafojan similan enketon. La samaĝaj geknaboj pli kreskis je 9.28 cm. en la alteco, 10 cm. en la brusta perimetro kaj 3.87 kg. en la korpopezo kompare kun la samaĝaj geknaboj de 1965. Ankaŭ la suferantoj de diversaj malsanoj multe reduktiĝis.

Kio kaŭzis la kreskon de la loĝantaro kaj ĝian bonkvalitiĝon? Kompreneble ekzistas multaj faktoroj, tamen la ekonomia disvolviĝo sendube estas la baza kaj krome pliboniĝo de la medicinaj kaj higienaj kondiĉoj ankaŭ ludis gravan rolon.

Antaŭ la liberiĝo la tibeta medicina afero estis postiĝinta. Antaŭ 1951, en tiu regiono de 1 200 000 kvadrataj kilometroj estis nur tri ŝtataj hospitaloj, malmultaj privataj kuracejoj kaj

tibetmedicinaj kuracistoj en Lhasa kaj Ŝjigaze.

Ekde la komenco de la 50-aj jaroj la centra registaro sendis grandnombrajn medicinajn laborantojn al Tibeto por kuraci kaj preventi malsanojn de la popolamasoj kaj elkulturi lokajn kuracistojn, kaj asignis grandajn monsumojn al Tibeto por tie fondi hospitalojn, epidemi-preventajn staciojn kaj aliajn higienajn instituciojn kaj funkciigi nombron da higienaj lernejoj kaj kursoj de higienaj laborantoj. En la fino de 1983 Tibeto jam havis 942 diversnivelaĵajn kuracajn kaj higienajn instituciojn, 6 900 medicinajn laborantojn, el kiuj estas 3 900 anoj de nacimalplimulto. En Tibeto estas 12 hospitaloj funkciigataj de la aŭtonoma regiono, krome la subregionoj, urboj kaj gubernioj ĉiu havas

sian hospitalon. 80% de la distriktoj havas sian propran kuracejon. Nun en la tuta Tibeto estas 4 579 malsanulaj litoj. Tie estas pli ol 70 epidemi-preventaj stacioj kun 960 laborantoj.

Kun la pliboniĝo de la higienaj kaj medicinaj kondiĉoj multe leviĝis la san-stato de la popolamasoj. Variolo, morbilo, tuberkulozo kaj aliaj kontaĝaj malsanoj, serioze minacantaj la tieajn loĝantojn, estis ekstermitaj aŭ multe malpliigitaj. La vivo de la loĝantoj longiĝis ĝenerale kaj malleviĝis la mortokvanto. En la tuta aŭtonoma regiono la mortokvanto malleviĝis de 2.8% en la komenco de la 50-aj jaroj al 0.82% en 1982. La disvastigo de sanprotekta laboro pri la virinoj kaj infanoj kaj de la nova akuŝiga metodo reduktis la mortokvanton de beboj de 42.7% en la 50-aj jaroj ĝis 19% en la 80-aj jaroj.

En Tibeto okupas gravan lokon la tradicia tibeta medicino kun historio de pli ol 2 000 jaroj. La tibetaj kuracistoj bazite sur la

loka medicino sorbis teoriojn kaj terapiojn de la ĉinmedicino kaj la hinda medicino enkondukita samtempe kun budhismo kaj iom post iom formis sian tibetmedicinon kun originala teorio kaj nacia koloro.


La tibetmedicinaj kuracistoj uzas pulso-palpon, pridemandon kaj observadon kiel siajn ĉefajn metodojn en diagnozo. Ili emfazas analizon al urino de malsanuloj. Laŭ la variado de la koloro, odoro, flosaĵo kaj sedimento de urino en la kondiĉoj varma, varmeta kaj malvarma, la kuracistoj povas diagnozi, kiu organo de malsanulo suferas de kiu malsano. La tibetmedicinaj kuracistoj ampleksas vegetaĵojn, animalojn kaj mineralojn, sume pli ol 2 000 specojn, en formoj de pilolo, tizano kaj pulvoro. Oni plejofte prenas la komponitajn pilolojn. La tibetmedicinaj receptoj estas kompleksaj, iuj medikamentoj entenas cent drogojn.

Nun krom la tibetmedicina hospitalo funkciigata de la aŭto-

noma regiono en Lhasa, tibetmedicinaj hospitaloj aperis ankaŭ en la subregionoj Ŝjigaze, Nagĉju, Ŝannan kaj Ali, kaj tiu en Ĉamdo nun estas konstruota. Plejparto de la guberniaj hospitaloj havas sian tibetmedicinan klinikon. En la tuta regiono estas pli ol 1 100 tibetmedicinaj laborantoj. En 1983 fondiĝis en Lhasa tibetmedicina kolegio, la unua en Ĉinio por sisteme kulturi mezgradajn tibetmedicinajn kuracistojn.

La tibeta medicino akumulis riĉajn spertojn en miljara praktiko. La tibetaj medicino kaj medikamentoj estas bonefikaj por kuraci oftajn malsanojn de altebenajaj loĝantoj, kaj ankaŭ kompare efikaj por kuraci kronikajn, stomakajn kaj intestajn malsanojn, artriton kaj malsanojn de nervaj sistemoj, tiel ke ili estas ŝatataj ne nur de tibetanoj, sed ankaŭ de alinaciecaj popoloj kaj eksterlandanoj. En la lastaj 3 jaroj la Tibetmedicina Hospitalo en Lhasa ricevis pli ol 1 000 leterojn el 28 provincoj, municipoj kaj aliaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio, kaj Usono, Francio, Italio kaj aliaj landoj, kiuj petas kuracadon aŭ medikamentojn. La hospitalo taskis al spertaj kuracistoj fari diagnozon laŭ la skribaĵo de malsanuloj en leteroj kaj akurate sendis medikamentojn al ili, kio estas aplaŭdata de la en- kaj eksterlandaj malsanuloj.

En operaciejo de la Ŝjigaze-a Popola Hospitalo
Foto de **ŜIN HŬA**



Tibetaj geknaboj

Foto de ĈENG
MINGGUJ



Tibetaj maljunulinoj

Foto de TUDENG





Familio en ferio

Foto de ĜAGŬOLŬO





En parko

Foto de **ŜJŬE ĈAŬ**


Amuzejo en Lhasa

Foto de **KANG SONG**

Filo de paŝtisto

Foto de **ĈENG
MINGGUJ**






Antaŭ pafo
de ĜU ĈENG

Sportaj skulptaĵoj


Fotoj de LAŬ BAJ



Flugpilkado de JAN JONGMING kaj LI DELONG




marŝo al la mondo
LIAN GINDUO





Konkurso, paco kaj amikeco

de LIŬ ĜENGDE



En mateno
de **SUN CÚANG**





Cenpilkado de **JANG DONGBAJ**

Naço de **FENG JIGUJ**



国籍和语言

Ŝtataneco kaj Lingvo

I. Ofte uzataj vortoj

您是哪个国家的人
我是法国人
您从哪来
我从巴黎来
您会说世界语吗
我会
您会不会说汉语
会一点
请慢一点说

nín shì nǎge guójīā de rén
wǒ shì fǎguó rén
nín cóng nǎr lái
wǒ cóng Bālí lái
nín huì shuō shìjièyǔ ma
wǒ huì
nín huì bù huì shuō hànǔ
huì yīdiǎnr
qǐng màn yīdiǎnr shuō

kia estas via ŝtataneco
mi estas franco
de kie vi venis
mi venis el Parizo
ĉu vi parolas Esperanton
jes
ĉu vi parolas la ĉinan lingvon
iomete
bonvolu paroli iom malrapide

II. Dialogo

A: 您是哪个国家的人?

A: Nín shì nǎge guójīā de rén?
vi est- kiu ŝtat- de hom-

A: Kia estas via ŝtataneco?

B: 我是法国人。

B: Wǒ shì Fǎguó rén.
mi est- franc- hom-

B: Mi estas franco.

A: 您从哪儿来?

A: Nín cóng nǎr lái?
vi de kie ven-

A: De kie vi venis?

B: 我从巴黎来。

B: Wǒ cóng Bālí lái.
mi de Parizo ven-

B: Mi venis el Parizo.

A: 您会说世界语吗?

A: Nín huì shuō Shìjièyǔ ma?

Klarigoj:

1. 您从哪儿来: “从” staras antaŭ la vorto signifanta lokon por montri la punkton de la spaco, kie komenciĝas movo.
2. 您会说世界语吗: “会” + verbo signifas, ke oni scias fari ion aŭ havas ian kapablon.
3. 您会不会说汉语: Oni faras demandan frazon kun jesa kaj nea verb- aŭ adjektivformo.
4. 会一点儿: “一点儿” staras malantaŭ iuj verboj aŭ adjektivoj por montri malgrandan kvanton aŭ malaltan gradon.

vi pov- parol- Esperant- ĉu'

A: Ĉu vi parolas Esperanton?

B: 我会。

B: Wǒ huì.

mi pov-

B: Jes.

A: 您会不会说汉语?

A: Nín huì bù huì shuō hànǔ?

vi pov- ne pov- parol- ĉin-lingv-

A: Ĉu vi parolas la ĉinan lingvon?

B: 会一点。请您慢一点

B: Huì yīdiǎnr. Qǐng nín màn yīdiǎnr shuō.

shuō.

pov- iomet-, bonvol- vi malrapid-
iom parol-

B: Iomete. Bonvolu paroli iom malrapide.



Printempo en Norvegio

de **W. ULLMANN** (FR
Germanio)

FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ



En Sofio, Bulgario

de **ALI-REZA-
HASSAN** (Irano)

813 W



一鳴先生清画
戊子八十八歲
齋白

